# REGo

## ☆ RUSIA ESPERANTO-GAZETO ☆

*komuna eldono de REU kaj REJM* *№ 1 (26) februaro 2005*




*en la numero*

*jubileaj datoj de la jaro 2005*

*Grigorij Demidjuk – motoro de la movado en la 20-30-aj jaroj*

*raporto de la REU-Estraro*

*aŭtoraj rajtoj kaj falsaj ambicioj*

*prelegvojaĝo en la angulo de Eŭropo*

*"Bulteno de REU", "REJM-info", novaĵoj, anekdotoj kaj multo alia*

**Moskvo, 2005**

# JUBILEAJ DATOJ DE LA JARO 2005

*gravaj por la rusia E-movado*

---

Ilja Ostrovskij (1855 – ?) – 150 jaroj
Antoni Kofman (1865 – 1940) – 140 jaroj
Aleksandr Saĥarov (1865 – 1942) – 140 jaroj
Universalaj Kongresoj de Esperanto – 100 jaroj
SEJM (Sovetia Esperantista Junulara Movado) – 40 jaroj
Tiĥvina E-klubo – 30 jaroj
15.01 – Danielo Kolker – 70 jaroj
03.02 – Paul Ariste (1905 – 1990) – 100 jaroj
09.02 – Grigorij Demidjuk (1895 – 1985) – 110 jaroj
09.02 – Henrik Seppik (1905 – 1990) – 100 jaroj
11.02 – Sergej Kuznecov – 60 jaroj
14.02 – Igorj Fejgin – 50 jaroj
27.02 – Ĵomart Amzejev – 50 jaroj
11.03 – Vladimir Sibircev – 70 jaroj
14.03 – Viktor Grigorjev – 80 jaroj
03.04 – Georgij Teterin (1905 – 1972) – 100 jaroj
14.04 – David Armand (1905 – 1976) – 100 jaroj
01.05 – Viktor Ĵavoronkov (1885 – 1938) – 120 jaroj
19.05 – Sergej Derevjanniĥ – 40 jaroj
21.05 – Vera Vlasova – 50 jaroj
17.06 – Vladimir Samodaj – 70 jaroj
26.06 – Jelena Lebedeva (1965 – 1997) – 40 jaroj
15.07 – Vladimir Ŝmurlo (1865 – 1931) – 140 jaroj
15.07 – Dmitrij Oŝĉepkov – 40 jaroj
24.07 – Vadim Ĥmelinskij – 70 jaroj
14.08 – Mikaelo Lineckij – 60 jaroj
17.08 – Aleksandr Fjodorov – 50 jaroj
10.09 – Eŭgeno Aisberg (1905 – 1980) – 100 jaroj
11.09 – Irina Kirina – 40 jaroj
03.11 – Oljga Semjonova – 50 jaroj
06.11 – Oleg Kuznecov (1965 – 2001) – 40 jaroj
10.12 – Nikolaj Danovskij (1905 – 1988) – 100 jaroj
13.12 – Andrej Liskov – 40 jaroj
14.12 – Herbert Muravkin (1905 – 1937) – 100 jaroj
24.12 – Stanislav Kotljarov – 70 jaroj

## SURVOJE AL REK-EOLA-2005

REU-estraranoj, UES kaj Tjumena E-klubo "Revo" daŭrigas laboron pri kun-organizado de REK-EoLA-2005. Nia entuziasmo kaj optimismo ne velkas, ideoj kaj energio ne mankas. Jen estas unu el la ideoj: urala esperantistaro anoncas sian intereson aranĝi dum REK kelkajn programerojn sub la titolo "SEJM – kvardekjara", kiuj estos dediĉitaj al la 40-jariĝo de la organizita sovetia junulara E-movado. Ni jam komencis kontakti la fondintojn de SEJM kaj multajn iamajn SEJM-aktivulojn kaj kun ĝojo vidas, ke nia ideo trovas reeĥon en multaj animoj. Jam aliĝis aŭ esprimis sian deziron baldaŭ aliĝi: V.Samodaj, A.Gonĉarov, M.Bronŝtejn, V.Aroloviĉ, V.Bespalov, L.Novikova, V.Roĵdestvenskij, A.Kalaŝnikov, D.Cibulevskij k.a. Ni havos ŝancon rigardi la historion de nia E-movado, aŭskulti rememorojn de SEJM-aktivuloj, vidi fotojn. Retrorigardante la pasintan gloron ni povas ne nur taksi la signifon, valorecon de iamaj eventoj, sed eble pli bone komprenos tion, kio okazas en nia movado nun. Iu bone diris, ke rememorante pri la pasinteco ni samtempe penas per tio prizorgi la estontecon.



*en Jekaterinburg ĉiuj E-renkontiĝoj estas tre bonetosaj*

Krome, uralaj esperantistoj iniciatis fonduson sub la titolo "SEJM – kvardekjara", la kolektota mono estos uzita por faciligi partoprenon de SEJM-veteranoj en aranĝoj de REK-24. Jam tri Jekaterinburgaj esperantistoj donacis por la fonduso 6000 rublojn. La dezirantoj subteni la iniciaton povas sendi monon laŭ la adreso: ***Jekaterinburg, 620041, ab.k. 132, Kudrjavcev Viktor Vasiljeviĉ*** kun la indiko "por fonduso "SEJM-kvardekjara"".

Daŭrigante formikan laboron por preparo de EoLA-17 ni devas rimarki, ke estas vere mirinde konstati dume nesufiĉan aktivecon de REJM-anoj en okazonta aranĝo. Sed ni esperas, ke tio estas manko dume kuracebla, kaj alvokas REJM-anojn engaĝiĝi pli aktive. Jam certiĝis la afero de la amasejo: unu tagnonkto en la amasejo en "Bodrostj" kostos 50 rublojn. Eble multaj atendis ĝuste tiun informon! Nun finu naĝi en duboj kaj aliĝu al EoLA!

La organiza teamo daŭre kolektas sinanonsojn por partopreno en diversaj branĉoj de EoLA-17. Daŭras kontaktoj kun niaj muzikistoj, bardoj, kiuj povos muzikigi la etoson dum REK-EoLA: M.Bronŝtejn, S.Bozin kun la grupo, A.Peĉonkin, A.Radajev, V.Soroka, A.Obrezkov.

Karaj amikoj! Ĝis REK-EoLA-2005 restas malpli ol du monatoj! Vekiĝu de vintra dormo kaj malaktiveco! Aliĝu! Venu al Jekaterinburg por ricevi historiajn, geografiajn kaj artajn impresojn!

## *Anatolo Sidorov (Sankt-Peterburg)*

# Grigorij Demidjuk – motoro de la sovetia esperantista movado de la 1920-30-aj jaroj

La mondfama, sed senespere arkaiĝinta "Enciklopedio de Esperanto"[1] per 10 linioj informas pri sovetia esperantisto G.Demidjuk. Estas konate, ke Demidjuk estis unu el la plej brilaj steloj en konstelacio de la sovetiaj esperantistoj. Ĉi-jare la tuta esperantistaro celebros du datrevenojn: 110 jaroj post la naskiĝo de Demidjuk kaj 20 jaroj post lia morto. Tamen kion oni scias pri Demidjuk krom tio, ke li estis komunista esperantisto kaj eminenta sciencisto? Mi proponas pli riĉan biografian skizon, ol donis la "Enciklopedio".

Grigorij Prokopjeviĉ Demidjuk naskiĝis la 9-an de februaro 1895 en la vilaĝo Podomŝe, en Brest-Litovska distrikto de Grodna gubernio. Fine de la 90-aj jaroj liaj gepatroj transloĝiĝis en Moskvon. La patro de Grigorij laboris kiel fervojisto.

Grigorij ellernis Esperanton en 1909. En Moskvo li finis Komercan lernejon. Estante studento, li en 1912-14 aktivis en Moskva Societo Esperantista[2]. En 1914 li kun M.Aleksandrov publikigis protestan leteron "Pro tro ofta eldonado de glumarkoj Esperantaj ne por propagando kaj utilo de Esperanto, sed por propraj celoj de eldonistoj"[3].

Post komenco de la Unua Mondmilito Grigorij militiservis kiel volontulo en artileria baterio ĝis la fino de la milito. En januaro 1919 li estis denove mobilizita kiel oficiro kaj batalis kontraŭ la armeoj de Kolĉak kaj Judeniĉ. En 1920 li estis sendita al Ĉefa Arme-inĝeniera lernejo, al fako pri civila uzo de la eksplodmaterialoj.

En 1921 Grigorij eksiĝinte el la Ruĝa Armeo renovigas sian E-agadon. (En la sama jaro estis fondita Sovetlanda Esperantista Unio – SEU.)

En junio 1922 en Moskvo G.Demidjuk, N.Futerfas, N.Nekrasov, V.Poljakov, S.Hajdovskij, E.Miĥalski fondis eldonasocion "La Nova Epoko" kaj samnoman literatur-socian internacian revuon. En la sama jaro Moskvon vizitis la fondinto de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) Eŭgeno Lanti por organizi kunlaboron de du revoluciaj laboristaj organizaĵoj. Kun Lanti amikiĝis Demidjuk kaj N.Nekrasov, ilia korespondado daŭris dum dek jaroj: 1922-1932[4].

La revuo helpis al la redakcianoj kontakti multajn esperantistojn sovetiajn kaj eksterlandajn. Ili ankaŭ eldonis libretojn en Esperanto kun versaĵoj de Miĥalski kaj Nekrasov. La redakcio ekspedis "La Novan Epokon" al multaj Esperantaj gazetoj de la mondo, kiuj reciproke kaj interŝanĝe alsendis siajn gazetojn kaj ankaŭ eĉ – por recenzado – Esperanto-librojn. "La Nova Epoko" fariĝis vaste konata inter tiama progresema esperantistaro. De la alia flanko la gazeto estis por la internacia

---

[1] Enciklopedio de Esperanto, Budapest, 1986, p. 107.
[2] La Ondo de Esperanto, 1913, № 11, p. 176; 1914, № 1, p. 6.
[3] La Ondo de Esperanto, 1914, № 1, p. 51.
[4] *Lins U.* Drezen, Lanti kaj "La Nova Epoko" // Sennacieca Revuo, 1990, № 118, pp. 1-15.

esperantistaro fenestro al postrevolucia Ruslando.

En 1923 Demidjuk estis elektita kiel organiza sekretario de SEU. Pro la komisiita laboro aperis serio de revoluciaj verkoj de la “Komunista biblioteko”: “Jarkvino de la Oktobra Revolucio. Kvinjaro de Sovetlando” de L.Sosnovskij (1923), “Revoluciaj kantoj” (1923). En 1924 aperis “Komunista Movado. Historia skizo” en traduko de G.Demidjuk.

En 1923 al la 3-a SAT-kongreso en Kaselo venis ses sovetiaj esperantistoj, inter ili ankaŭ Demidjuk. Dank’ al kongruo de la politikaj celoj de SAT kaj SEU estis lanĉita fruktodona kunlaboro de ambaŭ organizoj konforme al la proklamitaj celoj. Kadre de la kunlaboro Demidjuk gvidis la scienc-teknikan parton, N.Nekrasov – la literaturan, la franco M.Boubou – la pedagogian. SAT-organoj “Sennaciulo” kaj “Sennacieca Revuo” estis la plej popularaj kaj vaste legataj ne nur en Sovetio kaj Germanio, sed ankaŭ tra la tuta mondo.


*1912. Grigorij estas lernejano*

Dum la 6-a SAT-Kongreso, okazinta en Leningrado en 1926, Demidjuk konatiĝis kun germanaj eldonistoj de SAT-literaturo – Walter Kampfrad kaj Otto Bäßler, kiuj iĝis liaj plej intimaj amikoj kaj kunlaborantoj.

En 1926 aperis lernolibro “Radio-Esperanto”[1] verkita de Demidjuk. Samjare SAT eldonis en lia traduko la libron de V.Lenin “Ŝtato kaj revolucio”.

CK SEU starigis al Demidjuk taskojn: eldonado de “Bulteno de CK SEU”, “Internacia Lingvo” (en la rusa), eldonado de lernolibroj, vortaroj, propagandaj presaĵoj. Demidjuk sukcesis grave ampleksigi la eldonlaboron – aperis lernolibroj de S.Rublov (1927), V.Svistunov (1928), vortaroj Esperanto-rusa de V.Sutkovoj (1928) kaj Granda rusa-Esperanta de I.Izgur kaj V.Kolĉinskij (1933), “Biblioteko de la sovetia esperantisto” en la rusa.

En 1928 G.Demidjuk kaj A.Jodko ricevas nomumon kiel respondecaj redaktoroj de la grava enlanda revuo “Informoj de CK SEU”.

La eldonado helpis plifortigi la financan bazon de SEU, lui vastan ejon por librotenejo, ekspedejo, havi pagatan laboranton – kamaradon P.Gavrilov, kiu ĝis tiam estis librovendisto en la librejo “Novaja Derevnja”. Fortiĝis ankaŭ SAT, vastigante sian eldonlaboron. Al tiu periodo apartenas iniciataj klopodoj de N.Modenov, kiu laboris kiel vicestro de la Popola Komisarejo de la Poŝto. Tiam estis emisiitaj poŝtmarkoj kun E-teksto: “Inventisto de radio – Popov” (1925, 1927), “VI Internacia proletaria Esperanto-Kongreso 1926” (1926), “1887-1927

[1] Радио-Эсперанто. Первое ознакомление радиолюбителя с эсперанто. Русско-эсперантский и эсперанто-русский словарики, “Новая Эпоха”, 1926, 32 с.

XL Esperanto" (1927), "Centra Telegrafo Moskvo" (1930), "Volĥov HES je la nomo de Lenin" (1930). Kun propagandaj celoj estis eldonitaj dum 1926-1927 poŝtkartoj kun favoraj al Esperanto esprimoj de komunistaj eminentuloj: A.Lunaĉarskij, L.Sosnovskij, M.Boguslavskij, V.Kolarov kaj H.Barbusse, Sen Katayama, L.Krasin.

Dum la 1920-aj Demidjuk kontribuis al multaj E-organoj. Liaj artikoloj publikiĝis en ruslingvaj gazetoj "Sovetia Esperantisto", "Informoj de CK SEU", "Internacia Lingvo". Ankaŭ en la artikolkolekto "Sur vojo al internacia lingvo" (Moskvo, 1926) aperis lia artikolo "Movado por la internacia lingvo" (en la rusa). Li ankaŭ kontribuis al "Sennaciulo" kaj "Sennacieca Revuo".

En 1929 Demidjuk partoprenis la 9-an SAT-Kongreson en Leipzig. Samjare estis eldonita vica verko de V.Lenin "Pri religio" en la traduko de Demidjuk.

Verŝajne ĝuste dank' al alta kvalito de liaj tradukoj de Lenin-verkoj Demidjuk en 1931 estis invitita partopreni en grandioza traduklaboro de la 16-voluma Lenin-verkaro. En 1932 aperis pomonata eldonplano. Estis publikigitaj prospektoj kaj varba glumarko por Esperanta eldono kun la teksto "Subtenu Lenin-verkaron". Sed pro nekonata kialo la planita eldonserio ne aperis.

Fine de la 1920-aj streĉiĝis rilatoj inter SAT kaj SEU, ĉar komunistaj esperantistoj, precipe en Germanio kaj Sovetio, deziris ke SAT agu sub gvido de Kominterno. (En 1929, antaŭ prognozebla skismo, SAT entute havis 6329 membrojn, inter ili 1987 loĝis en Sovetio kaj 1833 – en Germanio; entute 3820 – 60,4 % de la SAT-anaro.) SAT-estraro kun Lanti ĉekape provis rezisti kontraŭ ĉiu ajn partia influo. En komenco de la 30-aj pro politikaj, financaj kaj ideologiaj kaŭzoj la rilatoj inter SEU kaj SAT ĉesis. Pro la skismo sovetiaj esperantistoj perdis la eblon aboni SAT-organojn "Sennacieca Revuo" kaj "Sennaciulo" kaj aĉeti SAT-literaturon. Por ŝtopi la breĉon en 1930 en Leipzig estis fondita "Eldonkooperativo por Revolucia Esperanto-Literaturo" (EKRELO). En oktobro 1930 en Moskvo aperis nova gazeto "Internaciisto", kiu poste estis eldonata en Berlino. EKRELO dum 9 jaroj eldonis 73 titolojn de revoluciaj kaj beletraj verkoj. Ĉiuj libroj estis presitaj en Moskvo kaj disvastigitaj en la tutan mondon pere de Leipzig-a agentejo, kiu apartenis al W.Kampfrad. Kontraŭ la enspezoj W.Kampfrad aĉetis por SEU litertipojn kaj cirilajn skribmaŝinojn, kiujn oni transportis helpe de la Komunista Partio de Germanio (KPG) al Sovetunio.


*ĉ. 1928*

Fakte Demidjuk estis dua gvidanto en EKRELO kune kun Walter Kampfrad, ĉar li

respondecis pri la eldonagado de SEU. Demidjuk ne nur lingve kontrolis la verkojn, sed ankaŭ tradukis (ekz. I.Stalin "Kulturo nacia kaj internacia", 1931)[1].

Ekde 1931 pro la profesia trookupiteco Demidjuk ne povis dediĉi pli da tempo al E-agado. Ĝuste fine de la 20-aj – komence de la 30-aj li laboris po 18 horojn ĉiutage! Li preskaŭ ĉesis labori por Esperanto, sed restis membro de CK SEU.

Pro la skismo en 1932 ĉesis la dekjara korespondado inter Demidjuk kaj Lanti. La disiĝo estis por ambaŭ personoj doloriga[2].

Pro amasaj reprezalioj, kiuj furiozis en Sovetio fine de la 30-aj, estis arestitaj multaj gvidantoj de SEU kaj ordinaraj esperantistoj.



*Ĉefinĝeniero G.Demidjuk en 1937*

Demidjuk-on oni arestis la 10-an de februaro 1938. La 23-an de julio 1940 li estis akuzita "pro la partopreno en kontraŭsovetia organizaĵo (SAT)" kaj kondamnita por 8 jaroj. La punejo de Demidjuk estis la urbo Kansko de Krasnojarska regiono. En 1945-1955 li estis en ekzilo.

Laŭ decido de la Milita tribunalo la 8-an de decembro 1955 Demidjuk estis plene rehonorigita. Evidente pro la senkaŭza puno kaj ekzilo Demidjuk rifuzis partopreni en la renaskiĝinta E-agado. De tempo al tempo li vizitis Moskvan centran E-klubon. Certe moskvaj esperantistoj fieris kontakti la faman veteranon. Ekzemple la 11-an de marto 1974 ili aranĝis vesperon de rememoroj, dum kiu Demidjuk rakontis pri apero de Lenin-libro "Ŝtato kaj revolucio" en lia traduko[3].

Pro profesia laboro kaj poste pro la aĝo li ne partoprenis en E-agado[4], preskaŭ ne korespondis, sed abonis kaj legis Esperanto-gazetojn kaj renkontiĝis kun eksterlandaj esploristoj: Eduard Borsboom[5] (1973) kaj Detlev Blanke (1982). D.Blanke dum sia renkontiĝo surprizis Demidjuk-on, informinte, ke la libron "Ŝtato kaj revolucio" oni eldonis en Japanio en 1967. En sia artikolo D.Blanke listigis verkojn

---

[1] *Blanke D.* La historio de EKRELO // Impeto '91. Soci-politika kaj beletra almanako, 1991, pp. 69-89.

[2] *Lins U.* Disigitaj amikoj // La Ondo de Esperanto, 1996, № 3, pp. 16-20; № 4-5, pp. 14-21.

[3] *Харьковский А.* Ленинская книга – боевое оружие // Советская молодёжь (орган ЦК ЛКСМ Латвии), № 145 (7423), 23 июля 1974 г.

[4] *Demidjuk G.* Mi ne timis persekutojn // La Ondo de Esperanto, 1997, № 2, pp. 26-27.

[5] *Borsboom E.* Vivo de Lanti, Parizo, SAT, 1976.

de Demidjuk[1]. Temas pri: a) 5 tradukoj de politikaj verkoj; b) 11 tradukoj de beletro; c) 1 literatura verko; ĉ) 2 artikoloj scienc-teknikaj; d) 31 artikoloj pri E-movado.

---

Dum sia longa vivo Demidjuk estis multfoje arestita.

La unuan fojon – en 1920 pro akuzo pri intenco vendi ŝtatposedatan alkoholon. (Tribunalo absolvis lin.) La duan – en 1924 pro trovitaj ĉe li stampiloj de la ŝtata deponejo de eksplodaĵoj. (Pri la stampiloj sciis lia ĉefo, kaj la akuzo estis refutita.) La trian – en 1931, kiam pro hazarda obuseksplodo estis homaj viktimoj. Demidjuk devis kontroli la eksplodlaborojn, sed ne faris tion. Laŭ decido de la Sekureca servo li estis kondamnita por 3 jaroj; estis liberigita en 1932 pro la interveno de la vicministro pri la peza industrio Pjatakov. La kvaran fojon – en 1938 – vidu supre[2].



*Demidjuk en 1970*

---

Ankaŭ la profesia agado de Grigorij Prokopjeviĉ Demidjuk imponas.

Li komencis labori en 1920 en "Vzrivselprom".

En 1930 li lanĉis regulan aperigon de la scienc-teknikaj artikolaroj "Vzrivnoje delo".

En 1933 li estis ĉefinĝeniero de la trusto "Sojuzvzrivprom". Pro uzo de malpli danĝeraj eksplodmaterialoj anstataŭ la dinamitaj Demidjuk en 1936 ricevis gratulon de la Ministro pri la peza industrio S.Orĝonikidze. Demidjuk esploris optimumigon de eksplodseriaj parametroj kaj kreis inĝenierajn metodojn de ties kalkulo kaj projektado.

En 1937 Demidjuk aperigis la unuan en Sovetio lernolibron "Eksplodlaboroj". Ĝis sia aresto en 1938 Demidjuk laboris kiel instruisto en la Instituto de orminado. Pro entuta kontribuo al fako de esploroj pri eksplodoj kaj pro la publikigitaj verkoj en 1938 li fariĝis kandidato pri la teknikaj sciencoj. Demidjuk la unua en landa literaturo donis gravajn rekomendojn pri normouzo en eksplodlaboroj, kio instigis al akumulo de la sperto en tiu fako.

Post la rehonorigo Demidjuk revenis Moskvon kaj komencis labori en Mineja

---

[1] *Blanke D.* Renkontiĝo kun Grigori Demidjuk // Der Esperantist, 1984, № 1 (123), pp. 5-7; 1985, № 4 (132), p. 82.

[2] Informo de Centra arkivo de Sekureca servo de USSR, 26 aprilo 1991, № 10/A-1176.

Instituto de Akademio de la Sciencoj de Sovetio.

En 1964 li fariĝis doktoro pri la teknikaj sciencoj.

En 1968 li estis jam profesoro kaj laboris plu en la Instituto de Minindustrio.

En 1975 li estis honorita kiel "Merita aganto en scienco kaj tekniko de RSFSR".

En 1980 li fariĝis pensiulo, sed laboris plu en la sama Instituto kiel scienca konsultanto.

Rezultoj de liaj scienc-teknikaj esploroj estis prezentitaj en la temaj eksponaĵoj de la fako de la sciencoj pri la Tero en la pavilono "Kosmo" de la ekspozicio "VDNĤ".

Dum sia vivo Demidjuk publikigis en la teknika literaturo pli ol 220 sciencajn verkojn, inkluzive 39 monografiojn, librojn kaj broŝurojn, ankaŭ 6 verkojn en la fremdaj lingvoj. Li aktive partoprenis en aranĝo de la tutsovetiaj scienc-teknikaj konferencoj, faris sciencajn prelegojn en Bulgario, Pollando kaj Ĉeĥoslovakio.

Demidjuk estis redakcia konsilanto de la eldonejo "Nedra" ("Tera sino"), redakciano de la revuo "Gornoje delo" ("Mina Industrio"), partoprenis kiel scienca konsultanto de "Granda Sovetia Enciklopedio" (3-a eld.) kaj de "Gornaja Enciklopedija" ("Mina Enciklopedio").

Pro multjara laborado la ŝtato honoris Demidjuk-on per la ordeno "Insigno de honoro" kaj per kvin medaloj; li ricevis ankaŭ la fakajn insignojn "Ŝaktista gloro" de la 1-a kaj 2-a gradoj.

Mortis Grigorij Prokopjeviĉ Demidjuk en Moskvo la 6-an de novembro 1985[1].

Pri G.Demidjuk la ASE-bulteno publikigis modestan memorartikolon[2].

***P.S.*** Se vi havas aliajn informojn pri G.Demidjuk, bonvolu sendi ilin al ***Anatolo Sidorov*** poŝte *192242, Sankt-Peterburg, str.Belgradskaja 10/3 – 27;* aŭ rete <anasido@esperanto.spb.ru>.

---

## LA FESTIVALO EN DAGESTANO

La Internacia E-Festivalo "Paco kaj Espero" estas planata inter la 7-a kaj 12-a de majo 2005 en Maĥaĉkala. La registaro de Dagestano promesas seriozan subtenon de la aranĝo kaj faros ĉion por ke la partoprenantoj estu kontentaj, ricevu belajn impresojn ktp.

En la provizora programo estas antaŭvidataj: loĝado en bonegaj kondiĉoj en la ĉemara ripozejo "Oraj sabloj"; interkona vespero; solena malfermo kun partopreno de gvidantoj de la respubliko, de famaj poetoj kaj artistoj en la speciala salono; fotoekspozicio "La Mondo de Espero" – viaj verkoj estas bonvenaj; internaciaj koncertoj; vizito al la festa koncerto de kulturmajstroj de la respubliko – eventuale kun partopreno de la gastoj; partopreno en la festaj aranĝoj de la respubliko; ekskurso al la 5-miljara urbo Derbento kun ĝia fama fortikaĵo kaj vina aŭ konjaka

[1] Der Esperantist, 1986, № 2 (136), p. 42.

[2] *Гончаров А.* Г.П.Демидюк // Информационный бюллетень АСЭ, 1986, № 3 (57).

uzino kun gustumado de niaj sunaj trinkaĵoj; ŝipa ekskurso kun ŝaŝlikumado; komprenebla, kvizoj, bard-kafejo kaj diskotekoj ankaŭ ne mankos.

Ĉiujn gastojn oni renkontos en la flughaveno kaj la stacidomo, dum la tuta semajno ĉe ni deĵoros bona buso. Speciale por tiuj, kiuj demandas min pri la sekureco: la situacio estas kvieta, krome, oni speciale gardos la ripozejon. Por dagestananoj la vortoj "amikeco" kaj "gasto" estas sanktaj! Dum la tuta periodo ĉe ni deĵoros ĵurnalistoj, inkluzive la respublikan televidon. Okazos gazetaraj konferencoj; ĉiu partoprenanto krom la suveniroj ktp. ricevos ankaŭ la filmon pri la aranĝo. Estas preparata speciala kolora fotorevuo pri Dagestano en Esperanto. Ankaŭ pluraj aliaj surprizoj atendas la partoprenontojn! Koran bonvenon!

Pri la vizoj por eksterlandaj gastoj zorgos la registaro. La organiza teamo ne estas tro granda, sed inkluzivas du ministrojn, vicurbestron kaj aliajn gravulojn, ankaŭ la prezidanton de REU, ni strebos fari ĉion por bonfarto de niaj gastoj!

Ĉiujn detalojn petu rete <junusov@xtreem.ru>, <junusov@dinet.ru>, telefone kaj fakse: +7-8722-630643.

***Abduraĥman Junusov, prezidanto de la Organiza komitato***

## INTERNACIA SEMINARIO PRI KUNLABORO DE ĜEMELURBAJ E-KOLEKTIVOJ

Karaj gesamideanoj, Tiĥvina Esperanto-Klubo invitas vin partopreni seminarion kun la temo esence grava por emfazi utilon de nia lingvo. La seminario pri la temo "Sperto kaj perspektivo de kunlaboro inter ĝemelurbaj Esperantistaj kolektivoj" okazos en Tiĥvin sub aŭspicioj de la Urbestraro ekde la 17-a ĝis la 20-a de septembro 2005. La programo, kiun vi ricevos poste, antaŭvidas laboron kaj distron, do – laŭtemajn prelegojn kaj diskutojn, kreon de la programo pri ĝemelurba esperantista kunlaboro por la sekvanta jarkvino, kvizon, koncerton, ekskursojn, ŝaŝlikumadon en arbaro k.t.p. Post la oficiala programo, ekde la 21-a de septembro por dezirantoj okazos tuttaga ekskurso al Velikij Novgorod. Same por dezirantoj estos organizita kelktaga restado en Sankt-Peterburgo.

Ni kun ĝojo akceptos la gastojn el la ĝemelurboj de Tiĥvin – Imatra (Finnlando), Herouville Saint Clair (Francio), Trosa (Svedio). Esperantistoj en la menciitaj urboj ricevis informojn pri la seminario anticipe kaj anoncis provizoran partoprenon. Ĉar burokratia preparado de invitleteroj por ricevo de rusaj enirvizoj okupas sufiĉe longan tempon, ni petas ĉiun alvenonton eksterlandan sendi al ni kserokopion de la pasporto kaj aliĝilon kun bezonataj informoj (petu specimenon ĉe la organizantoj). Ĉion ĉi ni devas ricevi antaŭ la 01-a de aprilo.

Ni bonvenigas ankaŭ interesiĝantojn el ĉiuj Esperanto-kluboj de Rusio kaj ekssovetiaj ŝtatoj, kies urboj havas ĝemelajn ligojn kun eksterlando. La seminario prezentas unikan eblon informiĝi pri kunlaboraj spertoj jam provitaj, rakonti pri spertoj propraj kaj ĝui kelktagan internacian etoson en la antikva rusa urbo Tiĥvin. Aliĝiloj de la dezirantoj atingu nin antaŭ la 01-a de julio. Partoprenkotizo estas nula. La Urbestraro de Tiĥvin promesis provizi nemultekostan buson por veturigi ĉiujn partoprenontojn de la seminario el Sankt-Peterburg al Tiĥvin kaj reen, ankaŭ por la ekskurso al Velikij Novgorod. La kunvenejoj estas prezentotaj senpage.

Ni antaŭvidas, ke eksterlandaj gastoj loĝos en la hejmoj de invitintoj. Se iu preferas hotelon – bonvolu informi nin pri tio. Por senvizaj gastoj ni aranĝos nemultekostan (eble senpagan) loĝadon. Manĝoj okazos en la urbaj kafejoj/restoracioj laŭplaĉe. La ekskursoj al la muzeoj de Tiĥvin kostas inter 1 kaj 2 eŭroj. Bonvolu ne sendi monon anticipe – ĉiujn bezonatajn pagojn vi sukcesos fari surloke.

La aliĝilojn kaj pasportkopiojn sendu al: Kandalinskij Viktor, p/k 2, RUS-187556 Tiĥvin, Rusio. Kontaktebloj: Mikaelo Bronŝtejn – tel. hejma +7-81367-26093, retadreso <mamuto@rambler.ru>, tel./fakso ofica +7-81367-52443; Aleksandr Belov – tel. hejma +7-81367-29638.

## INTERNACIA FESTIVALO DE KULTUROJ

Dum 23-30.05.2005 en la ĉefurbo de Ukrainio Kievo okazos Internacia Festivalo de kulturoj. Mi volas, ke la Festivalo estu vasta montro de diversaj specoj de naciaj kulturoj: rakontado de interesaj legendoj, demonstro de kutimoj kaj moroj, dancoj, kantoj, lingvoj kaj eĉ naciaj manĝaĵoj. Ni rakontu, montru al ni mem, kiom interesaj estas niaj kulturoj!

La aranĝo pasos en apudurba ripozejo, kiu situas en pitoreska arbaro kun freŝa aero. Tie sukcese okazis jam kelkaj internaciaj E-aranĝoj. Periodo de la Festivalo estas elektita speciale por ke la partoprenantoj povu spekti ankaŭ la tradician urbofeston – Tagojn de Kievo (28-29.05). Kaj ne nur spekti, sed ankaŭ partopreni en ĝi: promesis trovi eblon veni JoMo, loĝanta en la franca ĝemelurbo Tuluzo; atendatas knabina kant-ensemblo el alia nia ĝemelurbo Riga (Latvio); por vi kaj por la urbanoj ludos juna (19-jara) talenta pianisto el Rusio, laŭreato de multaj konkursoj – A.Korobejnikov (lian arton multaj esperantistoj jam ĝuis); estas traktata partopreno de la ensemblo "Asorti" el Litovio; V.Samodaj el Moskvo, Honora Membro de UEA, rakontos pri Arabio kaj montros multajn lumbildojn; ni esperas pri partopreno de aliaj interesaj artistoj kaj fakuloj.

Mi scias, ke post la elstaraj pasintjaraj politikaj eventoj la nomo de mia lando fariĝis signife pli konata en la mondo ol antaŭe. Kial do ne veni kaj ne konatiĝi kun ĝi? Kievo estas tre bela urbo kun pli ol 1500-jara historio. Ege gravas, ke ni preparas la aranĝon kunlabore kun nia urbodomo, kaj de la sukceso de Festivalo dependas rilato al praktikaj ebloj de Esperanto-movado flanke de neesperantistoj.

Mi serĉas kaj esperas pri viaj subteno kaj helpo: bonvolu plusendi la informon, rakontu pri ĝi al viaj amikoj (venu ankaŭ neesperantistoj por konvinkiĝi pri efikeco de la lingvo), la Festivalo fariĝu manifestacio de praktika uzo de Esperanto!

La Informon № 1 vi jam povas vidi ĉe <www.espero.kiev.ua> en la rubriko "Aranĝoj". Mi planas baldaŭ meti tien la provizoran programon, kiu multe dependas de viaj reeĥoj. Ne hezitu, venu, malfermu por vi novan landon Ukrainion!

Kontaktebloj: Mikaelo Lineckij, UEA-Delegito por Kievo (Ukrainio), retadreso <limih@bigmir.net>; hejma telefonnumero +380-44-4320743, poŝtelefono +38-039-2477483; poŝtadreso – p.k. 91, Kijivo-201, UA-04201, Ukrainio.

***Mikaelo Lineckij (Kievo)***

## LA IDEO MORTIS… VIVU LA IDEO!

Pasas la kvina jaro post la ekeldono de nova rusia dumonata periodaĵo REGo – aktuala kaj multfaceta, estiĝinta nepra parto de la landa E-movado. Tio signifas, ke proksimiĝas la plej unua jubileo de nia gazeto, egalinteresa preskaŭ en ĉiuj numeroj. Eblas ankaŭ mencii la koloran kovrilon, unuafoje plibonigintan la eksteraĵon de ĝia 25-a numero. Sed tempo de la jubileaj laŭdegoj ankoraŭ ne venis, nun mi volas atentigi legantojn pri alia E-socia evento.

Ekde la unua numero REGo per buŝoj de tiamaj estraranoj de REU kaj aktivuloj-partoprenintoj de OkSEJT-40 deklaris la ideon okazigi en nia lando la plej gravan aranĝon de oficiala E-mondo, nome UK. Estis nomitaj ĉefaj kondiĉoj kaj supozataj jaroj – 2006 aŭ pli taŭga 2007, "kiam nia lingvo havos 120-jaran jubileon, kaj Moskvo – la 860-jaran". Kaj tio estis admirinda ideo!

Mi ne scias pri aliaj ordinaraj esp-oj, sed mi mem tuj ekscitiĝis pro tiu alvoko "konsciiĝi pri la graveco de UK en Rusio kaj fari ĉion eblan" sialoke por akceli ĝin. Mi persone en mia aĝo longe post la juneco decidis nepre ekposedi E-paroladon aktive, por libere interkompreniĝi kun alveturontaj eksterlandanoj. Kiel montris mia vizito al REK-21 decembre de 2001, tio estis malfacila tasko por unusola entuziasmulo el fora minista loĝloko ĉe superakvita minejo. Sed perspektive estis kelkaj jaroj por atingi tion, kaj mi esperis la sukceson. Al mi ŝajnas nun, ke ankaŭ multaj aliaj, ne havantaj sufiĉe da mono por alilandaj vojaĝoj, akceptis la ideon, kutimiĝis al tiuj pensoj kaj atendis "nian UK-on" samcele.

Do, mi atente sekvis ĉiujn opiniojn en REGo por kaj kontraŭ tio, precipe post "skeptika prognozo" de la multsperta V.Aroloviĉ (REGo № 5 (7), 2001), pentrinta malgajan bildon de "diversaj missurprizoj" dum la haste preparita UK; tiu artikolo videble malfervorigis ardon de iniciatintoj de rusia UK en baldaŭa tempo. La diskuto, proponita de la nuna REU-Prezidanto N.Gudskov por ellabori la strategian planon de rusia E-movado inkluzive UK (REGo № 1 (14), 2003), estis bedaŭrinde malvigla kaj donis rezulton ne por utilo de UK en proksimaj jaroj.

Definitivan punkton en tiu demando starigis raporto de la Estraro de REU al la venonta Konferenco en Jekaterinburg sen iu ajn mencio pri konsidero de la demando dum ĝiaj kunsidoj. Kaj nun mi jam scias, ke ne nur la jaro 2006, sed ankaŭ 2007 estas donita al aliaj landoj. Nu, kion do fari, se Rusio ĝenerale kaj REU aparte ne "maturiĝis por organizi UK-on, vidpunkte de la pozicio de Esperanto en la lando" kaj efektiva ekzisto de "necesa homa potencialo". Ni konfesu en la Konferenco, ke tio estis iom rapidema ideo kaj daŭre serĉu kuraĝon por kolekti "organizajn fortojn, kiuj nuntempe ne estas tro abundaj en nia lando".

Sed la ideo estas proklamita, dum kelkaj jaroj ĝi varmigis niajn korojn, iugrade ĝi aldonis al ni fortojn kaj movis antaŭen. Kaj ĝi ne devas perei!

En la nomo de senfamaj subtenantoj de tiu ideo mi petas la nunajn estraranojn kaj potencialajn kandidatojn anticipe pripensi la novan supozeblan "Jaron de UK" kaj post la Konferenco ĝustatempe firmigi siajn vicojn por inviti UK-on en Rusion. Ni devas frutempe vidi perspektivon kaj kompetenti pri tiu demando.

***Vladimir Sudakov (Rudnij, Primorskij regiono)***

# Bulteno de REU

## RAPORTO DE LA REU-ESTRARO

***al la Konferenco de REU***
***pri la agado en la jaro 2004 kaj komenco de la jaro 2005***

Inter la ĉefaj aktivecoj de REU, enorde plenumitaj de la Estraro kaj komisiitoj de REU, ni notu la sekvajn.

**1. Eldona kaj kultura agado**

1. Jarlibro-2004.
2. Manlibro (2-a, aktualigita eldono).
3. Regule kaj bonkvalite laŭ aspekto kaj enhavo aperadis REGo.
4. Estis rearanĝita kaj aktualigita la ttt-ejo <www.reu.ru>; en ĝi regule aperas novaĵoj, atingeblas ĉefaj dokumentoj de REU, instruprogramoj ktp., ekzistas bone aranĝitaj forumoj.
7. Estas prespreparita poezia antologio "Moskvaj sonoriloj" (en la momento de la skribo de la raporto, ĝi devas aperi antaŭ la Konferenco).
8. Estis eldonita por propagandcela disvastigo ruslingva broŝuro kun la artikolo de Claude Piron "Eŭropa interplekto de lingvoj" ("Европейское хитросплетение языков").
9. Daŭre regule aperadis la internacia revuo "Komencanto".

Tamen ne estis eldonita la planita plurlingva broŝuro kun materialoj de sciencaj konferencoj pri minoritataj lingvoj (Maĥaĉkala 2003, Ĉeboksari 2004), ĉar la organizintoj de la konferencoj ne sukcesis kolekti kontribuaĵojn de la partoprenintoj. Koncerne la planitajn kulturajn agojn, ankaŭ ne estis lanĉita planita konkurso por junaj verkemuloj. Bedaŭrinde, latentiĝis la funkciado de la Libroservo de REU, tion parte kompensas la libroservo de Moskva Esperanto-Centro, sed, unue, tio estas paliativo kaj, due, ankaŭ ties estonto estas necerta.

**2. Aranĝoj**

Tiudirekte estis plenumitaj la ĉefaj planitaj taskoj.

1. Regiona renkontiĝo "Printempo en Uralo", majo 2004.
2. REU helpis al MASI kaj REJM en preparado de Moskva Antaŭ-Kongreso kaj Internacia Junulara Kongreso (IJK-60), julio 2004.
3. Rusiaj Esperanto-Tagoj (RET-04), Tiĥvin, aŭgusto 2004.
4. REU helpis en organizo de la konferenco pri minoritataj lingvoj en Ĉeboksaro, oktobro 2004, kaj kontribuis al la sekvinta ĝin 9-a Lingva Festivalo.
5. REU partoprenis en organizo de StRIGo-10, novembro 2004.
6. Festado de la 10-jariĝo de la klubo MASI, 23.02.2005.
7. Okazas preparlaboro pri REK-24 kaj EoLA-17, Jekaterinburg, aprilo-majo

2005. Komenciĝis preparlaboroj pri RET-05, Jelec, aŭgusto 2005.

### 3. Instru-metodika laboro

1. En Moskvo estis establita profitdona E-centro, kiu okupiĝas pri instruado de lingvoj inkluzive Esperanton, kaj ankaŭ havas funkciantan libroservon.

2. Irina Gonĉarova gvidis TEJO-ILEI-seminarion kaj trejnadon de grupgvidantoj dum IJK-60.

3. La klubo EK MASI okazigis instruadon de E-o al la biciklantoj, partoprenintaj en la Internacia bicikla marŝo "Kritika maso".

4. Regule (dum kaj ekster aranĝoj) estis organizitaj ekzamenoj de ĈALK.

Ne okazis iuj ajn planitaj entreprenoj pri kolektado de informoj pri instruado de Esperanto enlande, pri lerneja instruado ktp.

### 4. Eksteraj rilatoj

Ne ĉiuj planoj ĉi-rilate efektiviĝis – ekz., ne okazis REU-kontribuo al Ago-Tago. Inter veraj aktivecoj necesas noti la supremenciitan broŝuron de C.Piron, grandan laboron de Viktoro Kudrjavcev, kiu sendis al diversaj gazetoj 128 priesperantajn artikolojn, el kiuj ĉ. 30 estis publikigitaj, kaj agadon de Irina Gonĉarova kaj la klubo MASI, kiuj prezentis kaj propagandis E-movadon en junularaj sociaj organizoj ("World for You", "Taking It Global", AIESEC, eksperimenta lernejo "Perspektivo", "Kritika maso" ktp).



*La Estraro kaj la Kontrol-revizia Komisiono de REU kunsidas dum UK-89 en Pekino*

---

Pri la persona kontribuo de la estraranoj, komisiitoj, REU-kluboj kaj aktivuloj. Bedaŭrinde, ne ĉiuj homoj normale plenumis siajn taskojn, aktiveco de certaj estraranoj kaj komisiitoj estis simple nerimarkebla, kvankam ili mem proponis siajn servojn al la movado kun ofte imponaj planoj. Inter tiuj, kiuj ja aktivis, necesas emfazi grandan laboron de la estraranoj Garik Kokolija (eldonado de REGo, partopreno en organizo de pluraj aranĝoj), Viktoro Kudrjavcev ("Komencanto", aranĝoj, ekstera agado), Irina Gonĉarova (aranĝoj, seminarioj, instruado), Mikaelo Ĉertilov (Moskva E-centro, rutina sed necesa laboro pri financoj), komisiitoj Viktoro Aroloviĉ (ordigo de tekstoj de REU-dokumentoj), Mikaelo Bronŝtejn (RET-04). Inter la kluboj (antaŭ kalkulo de la poentoj de interkluba konkurado) mi volas noti grandan laboron de MASI (aranĝoj, ekstera agado k.a.) kaj JEAĈR (LF, scienca konferenco k.a.). Inter aktivuloj, ne havantajn formalajn REU-postenojn, indas mencii la nomojn de Svetlana Smetanina, Vjaĉeslav Ivanov, Aleksandr Osokin kaj

Igorj Safonov. La du lastaj fakte desegnis kaj funkciigis la aktualan varianton de la ret-paĝaro de REU.

---

Kaj kelkaj vortoj pri la estonta Estraro. Mi ne scias, el kiuj ĝi konsistos (persone mi nepre ne kandidatiĝos denove por la prezidanta posteno), sed mi firme konsilas al la konferencanoj denove elekti tiujn personojn, kiuj reale laboris (kaj nepre ne elekti tiujn, kiuj faris nenion), kaj, krome, trovi novajn homojn, laŭeble junajn, kiuj kapablas labori kun la homoj kaj pruvis sian respondecon.

***Nikolao Gudskov, Prezidanto de REU***
***11.02.2005***

---

## JAM 1300 ALIĜIS AL VILNO

La nombro de aliĝintoj al la 90-a Universala Kongreso en Vilno superis jam 1300 fine de januaro. Pluraj aliĝiloj tamen ankoraŭ ne povis esti traktitaj, ĉar bankaj informoj pri la koncernaj pagoj ankoraŭ ne alvenis. La 31-an de januaro la registritaj aliĝintoj oficiale nombris 1294 el 50 landoj. Ekde la fino de decembro la nombro kreskis per 450 kaj aldoniĝis du pliaj landoj. La unuan lokon ankaŭ en januaro plu okupis la kongresa lando Litovio kun 154 aliĝintoj, proksime sekvata de Francio (145). Pli ol cent kongresanoj anonciĝis ankaŭ el Germanio (128) kaj Japanio (106), kaj tiun limon verŝajne jam baldaŭ atingos Pollando (75). En la januara statistiko sekvas poste Nederlando (56), Finnlando (54), Italio (51), Svedio (50), Belgio (46), Rusio (43), Danio (39), Britio (34), Ĉeĥio (31), Estonio (29), Svislando (24) kaj Korea Respubliko (23).

***(Gazetaraj komunikoj de UEA, № 198)***

## ANKAŬ EN DECEMBRO NOVAJ KOMISIONOJ

Ankaŭ en decembro la Estraro de UEA daŭrigis la konstruadon de la sistemo de komisionoj de UEA. En la Silvestra tago Prezidanto Corsetti deklaris la rezulton de la kompletigo de la komisiono pri la Internacia Kongresa Universitato (IKU), al kiu pli frue jam estis elektitaj Hans Michael Maitzen, Humphrey Tonkin kaj Christer Kiselman, kiu funkcias ankaŭ kiel sekretario. Pliaj membroj fariĝis Sabine Fiedler (Germanio) kaj Wen Jingen (Ĉinio).

Pli frue estis elektitaj la komisionoj pri Rondo Familia kaj pri Agado en Balkanaj Landoj. La agadon de Rondo Familia kunordigas estrarano Amri Wandel. Membras en la komisiono krome James Rezende Piton (Brazilo), Katarina Bodnarova (Aŭstralio), Jouko Lindstedt (Finnlando) kaj Stefan MacGill (Hungario). Du komisionanoj havas specialan taskon: Piton redaktas la bultenon “Familia Esperanto”, kaj MacGill estas komisiito pri la Internacia Infana Kongreseto. La komisiono pri Agado en Balkanaj Landoj konsistas el la kunordiganto Aurora Bute (Rumanio) kaj la membroj Boriŝa Miliĉeviĉ (Serbio kaj Montenegro), Bardhyl Selimi (Albanio), Viktor Galeski (Makedonio), Grozdenka Filipova (Bulgario) kaj Samir Ribic (Bosnio kaj Hercegovino).

***(Gazetaraj komunikoj de UEA, № 194)***

## UEA ELEKTAS DU MIL FUNKCIULOJN

Post la elekto de la Komitato, Estraro kaj multnombraj komisionoj kaj komisiitoj komenciĝis en UEA elekta procezo, kiu laŭ la nombro de elektotaj funkciuloj abunde superas ĉiujn aliajn elektojn en la Esperanto-movado. Temas pri la perioda elektado de la Delegita Reto de UEA. Laŭ la Regularo pri Delegitoj, kiu estis akceptita en la Tamperea UK en 1995, ankaŭ la delegitoj havas trijaran mandaton. Antaŭe la tempa mandato de delegitoj ne estis limigita, kio rezultigis interalie, ke en la Delegita Reto estis ĉiam pli da pasivaj membroj, kiuj ne plenumis siajn devojn kiel delegitoj. La nuna regularo ebligas kaj eĉ devigas ĉesigi la delegitecon de la pasiviĝintaj delegitoj.

En novembro la ĉefdelegitoj ricevis de la Centra Oficejo instrukciojn por la reviziado de la Delegita Reto en sia lando. Samtempe ili ricevis ankaŭ instigon varbi novajn delegitojn, por ke la Delegita Reto denove ekkresku. Jarlibro 1995 listigis ankoraŭ 2166 delegitojn, sed en la unua reviziado laŭ la nova regularo ilia nombro falis al 1830 en Jarlibro 1996. En postaj jaroj ĝi malrapide rekreskis, sed poste ĝi denove falis sekve de la malmultiĝo de individuaj membroj. Jarlibro 2004 registris 1783 delegitojn.

Por fariĝi delegito necesas esti individua membro minimume unu jaron antaŭ la delegitiĝo kaj daŭre resti tia por konservi la oficon. Ĉiu, kiu deziras fariĝi delegito, bv. kontakti la ĉefdelegiton de sia lando aŭ la Centran Oficejon de UEA. Eblas esti loka delegito (D), loka vicdelegito (VD), junulara delegito (JD) aŭ fakdelegito (FD). En sama loko povas esti nur po unu D, VD kaj JD. La nombro de fakdelegitoj ne estas limigita, sed sama delegito ne povas havi pli ol tri fakojn.

La trijara periodo koncernas ankaŭ la ĉefdelegitojn. Ilin elektas la Estraro de UEA surbaze de la proponoj de la aliĝintaj landaj asocioj. La ofico de ĉefdelegito estas tradicie inter la plej prestiĝaj taskoj en UEA, sed ĝi ankaŭ estas sufiĉe laboriga. Multaj ĉefdelegitoj krome estas kotizperantoj de UEA, sed tiuj du funkcioj tamen estas formale tute apartaj. En multaj landoj pri la perado de UEA-kotizoj zorgas la landa asocio.

***(Gazetaraj komunikoj de UEA, № 192)***

## LA LITOVA ŜTATESTRO – ALTA PROTEKTANTO DE LA 90-a UK

Prezidento de Litova Respubliko s-ro Valdas Adamkus akceptis la inviton esti Alta Protektanto de la 90-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos en Vilno de la 23-a ĝis la 30-a de julio 2005. La litova ŝtatestro esprimis sian varman sintenon al la UK jam en septembro 2001, kiam Ĝenerala Direktoro de UEA Osmo Buller vizitis Litovion por esplori la kondiĉojn por la okazigo de UK. Tiam s-ro Adamkus akceptis en la prezidenta palaco Buller kaj la prezidanton de Litova Esperanto-Asocio Povilas Jegorovas kaj parlamentanon Stasys Kruzinauskas. Dum la aŭdienco li menciis, ke li unuafoje interesiĝis kaj eĉ iom lernetis Esperanton kiel gimnaziano en Kaunas.

Valdas Adamkus naskiĝis la 3-an de novembro 1926 en Kaunas. Post la dua mondmilito li loĝis komence en Germanio kaj ekde 1949 en Usono, kie li dip-

lomiĝis kiel civila inĝeniero kaj okupis gravajn postenojn en la Usona Mediprotekta Agentejo EPA. Li estis ankaŭ kunordiganto de la usona helpo al la baltaj ŝtatoj pri mediprotektado, en kiu funkcio li povis ekde 1972 ĉiujare viziti sian naskiĝlandon. Li estis renoma aktivulo en la ekzila litova komunumo, precipe en ĝia kultura kaj sporta vivo. Ankoraŭ loĝante en Usono li komencis partopreni en la socia kaj politika vivo de Litovio post la restarigo de ĝia sendependeco. Reveninte al sia patrolando li en 1998 unuafoje elektiĝis prezidento de la respubliko por kvinjara mandato. Por la dua fojo li ekokupis la oficon de la ŝtatestro en 2004. Pro siaj meritoj por mediprotektado s-ro Adamkus ricevis internacian mediprotektan premion en 1988 kaj oran medalon de la Usona Mediprotekta Agentejo. En 2003 li fariĝis Ambasadoro de Bona Volo de Unesko por la konstruado de la informsocio.

***(Gazetaraj komunikoj de UEA, № 200)***

## UEA DENOVE HAVAS KOMISIONON PRI FAKA AGADO

Post longa paŭzo UEA denove havas komisionon pri faka agado. Dum iom da tempo la konata aktivulino de la instruista, katolika kaj SAT-agadoj Marija Beloŝevic (Kroatio) estis komisiito de UEA pri faka agado, sed la Estraro konkludis, ke pro la vasteco de tiu kampo pli konvena gvidorgano estas kelkmembra komisiono. Estrarano Amri Wandel estas kunordiganto de la nova komisiono. Krom Beloŝevic, kiel membroj estis elektitaj d-ro Petro Chrdle (Ĉeĥio), d-ro Imre Ferenczy (Hungario) kaj inĝ. Istvan Gulyas (Hungario). D-ro Chrdle respondecis pri la faka agado de UEA kiel estrarano en la periodo 1998-2001 kaj de multaj jaroj organizas la popularajn Konferencojn pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST). D-ro Ferenczy estas prezidanto de Universala Medicina Esperanto-Asocio, kaj inĝ. Gulyas vicprezidanto de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio. Ĉiuj komisionanoj estas membroj de la Komitato de UEA.

***(Gazetaraj komunikoj de UEA, № 196)***

## NECIVILIZA MAJUSKLIGO KAJ SINHUMILIGO

Viktoro Aroloviĉ (REGo № 6 (25), pp. 26-27) arde protestas kontraŭ tio, ke mi, kie de mi dependas, majuskligas la vorton *Esperanto* en la rusaj tekstoj, nomante tion neciviliza konduto. Mi, verdire, ne komprenas la kialojn de lia ardeco tiurilata, sed prefere ni konsideru liajn argumentojn. Da ili, fakte, estas du.

La unua, kaj sole grava, estas tiu, ke ekzistas iu certa normo de la rusa lingvo, fiksita en vortaroj eldonitaj de akademiaj institucioj, kaj oni obeu tiun normon. La dua (kaj iom ridinda) – ke en la oficiale registrita Statuto de REU la vorto *Esperanto* estas skribata de minusklo, kaj tio estas jam ne lingva, sed jura normo.

Mi provu respondi. Neniu akademia lingva institucio kreas normojn de ajna lingvo. Ĝin kreas la uzantoj de la lingvo. Akademiaj institucioj ĝin nur fiksas, kaj ion rekomendas. Sed la lingvoj evoluas, kaj la institucioj post certa tempo fiksas novajn normojn kaj rekomendas jam ilin! (Esperantistoj aparte bone tion scias laŭ funkciado de AdE, sed tiurilate la internacia lingvo nur sekvas la modelon de la naciaj.) En ĉiu koncerna fako la normon ellaboras la fakuloj, do ĉio, kio koncernas Esperanton en la naciaj lingvoj, dependas de ni, esperantistoj, kaj tiu normo, pri kiu

insistas ni, devas finfine veni ankaŭ en la akademiajn vortarojn. Cetere, apartenon de la vorto Esperanto al neŭtra genro, kio troviĝas ja en la vortaroj, ne sekvas Aroloviĉ mem, ĉar bone komprenas, ke la kompilintoj de la vortaroj, kiom ajn kleraj, rilate Esperanton estas analfabetoj. Male, pli-malpli kompetentaj lingvistoj, kiuj mencias Esperanton, la vorton majuskligas – malgraŭ ke ili ja bone scias, kio estas normo – pri tio Aroloviĉ diras mem! Do, la argumento estas nekorekta. Koncerne la Statuton, ĉio estas eĉ pli facila. La Statuton oni kompilis, kiam Aroloviĉ estis prezidanto de REU, kaj la minuskla formo aperis nur pro lia persona prefero (kaj ankaŭ premo!). Statutoj, ĝenerale, normigas agadon de organizoj, sed ne uzadon de la lingvo kaj des malpli ties evoluon!

Kaj nun pri majuskligo de vortoj en la rusa lingvo. Krom la ĉefa funkcio – signi la proprajn nomojn (eĉ se akcepti strangan opinion, ke Esperanto *ne* estas propra nomo!), ĝi plenumas kelkajn aliajn funkciojn. Ekzemple, ĝi certagrade povas anstataŭi difinan artikolon, kio gravas por senartikola lingvo. Foje ĝi montras emfazon en la teksto. Kaj – tre ofte – montras estimon de la aŭtoro de la teksto al certa objekto. Ekzemple, personaj pronomoj en la rusa laŭregule estas skribataj de minusklo – sed en ajna eldono de Evangelioj la pronomo *li*, kiam ĝi koncernas Jesuon, estas majuskligata! Ĉu nura malobeo al akademiaj normoj? Ne, simpla esprimo de estimo al tiu persono far eldonistoj! Kaj tio estas nur unu ekzemplo… Jen alia: laŭregule Государственная дума devas havi majusklon ĉe la unua vorto, sed minusklon ĉe la dua. Sed oni plej ofte majuskligas ambaŭ. K.s. Do, majuskligo de la vorto devas montri, ke ni estimas nian aferon – ne pli, sed ne malpli. Male, minuskligo signifas nian certan minuskomplekson kaj humiliĝon antaŭ malamikoj.

Por neesperantista publiko estas tutegale, kiel skribi la vorton *Esperanto* en la rusa – ĉu de majusklo, ĉu de minusklo. Ĝi sekvos nin, kaj nur nin, kiel la kompetentulojn. Sekve, kiel ni formos la normon en la rusa, tiel estos. Tial mi ĉiam faros ĉian eblon por montri, ke esperantistoj ja estimas sin mem, eĉ se Viktoro Aroloviĉ opinias, ke montri sinestimon estas maldece kaj necivilize.

Kaj la lasta rimarko. Mi en miaj fruaj esperantistaj jaroj vidis en diversaj fontoj ambaŭ formojn, kaj ĉion komprenis ĝuste tiel, kiel skribis supre. Tial mi komencis ĉiam skribi la propran nomon de nia lingvo de majusklo. Sed foje, hazarde doninte iun tekston al s-ino Lidia Ŝanina (sekretario de ASE, altrudita de ŝtataj instancoj al esperantistoj), mi ekaŭdis de ŝi la korekton: "Nomojn de lingvoj oni skribas de minuskloj" – ĝuste, kiel nun insistas Viktoro! Estis la lasta pruvo por mi: se malamiko de nia afero Ŝanina speciale atentas, ke oni humiliĝu skribante Esperanton de minusklo, necesas fari nepre kaj ĉiam male! Ja malamikoj ĉiam vidas signifon de tiaspecaj aferoj pli bone ol adeptoj… Sed Viktoro, verŝajne, tiutempe tiom ofte aŭdis admonojn de diversaj ŝaninoj, ke – ve! – ial ekkredis je ilia praveco.

Do, mi alvokas ĉiujn ruslingvajn esperantistojn: ne eraru, ne subiĝu al opinioj de kaŝaj kaj malkaŝaj malamikoj de Esperanto, kaj ne hezitu skribi la vorton *Эсперанто* de la nepre necesa komenca majusklo, eĉ se tio ŝajnos al iu necivilizа konduto!

***Nikolao Gudskov (Moskvo)***

## KULTA ADORADO, aŭ KIU SENTAS KOMPLEKSON?

Laŭ N.Gudskov, mi "opinias, ke montri sinestimon estas maldece kaj necivilize". Nu, li plian fojon misprezentas mian vidpunkton. Pri sinestimo mi diris nenion, la vorton "maldece" mi ne uzis, kaj per la esprimo "ekster ĉia civilizita etiko" mi karakterizis ne la majuskligon de la lingvonomo ruslingve, sed la etikan aspekton: iu kaŝe kaj senpermese mastrumaĉas en fremda teksto, per tio falsante la vidpunkton de ties aŭtoro pri iu demando (kiu konkrete, ĉi-aspekte eĉ ne gravas).

La priskribita de Gudskov skemo, laŭ kiu normojn ellaboras fakuloj kaj lingvistoj ilin fiksas, validas ĉefe pri terminoj. Sed atribuo de vortoj al kategorioj de propraj aŭ komunaj nomoj, de kio dependas la majuskla aŭ minuskla formoj, estas jam kompetenteco de lingvistoj. Se tiel ne estus, la sistemo de lingvaj normoj dependus de tro multaj subjektivaj faktoroj kaj estus multe malpli kohera.

La lingvaj normoj estas ne simple rekomendoj, kiujn oni povas laŭplaĉe sekvi aŭ ignori, sed io pli grava. La menciita en mia antaŭa artikolo ROS ("Русский орфографический словарь") dorsflanke de la titolfolio estas kvalifikita kiel "нормативное общеобязательное справочное пособие", do ĝi estas siaspeca lingva "ГОСТ". La rezonado de Gudskov pri la neŭtra genro atestas, ke la konsultitaj de li vortaroj ne estas akademiaj aŭ havas "la duan freŝogradon". La akademia vortaro de Oĵegov almenaŭ en 1990 (tiun mi havas submane, sed eble eĉ pli frue) jam fiksis la genron de *эсперанто* unuarange kiel viran kaj nur duarange kiel neŭtran. La samon registris ROS. Estas maljuste akuzi la vortaristojn pri analfabeteco rilate Esperanton. Ĉiuokaze tio certe ne validas pri la ĉefredaktoro de ROS profesoro Vladimir Lopatin, la edzo de Ludmila Lopatina – iama aktivulino de "Fajrero" kaj filino de Jevgenij Bokarjov. Kompreneble, apartenante al tia familio, prof. Lopatin ne povas ne scii almenaŭ bazajn faktojn pri nia lingvo kaj la movado.

Gudskov aludas pri "pli-malpli kompetentaj lingvistoj", ne menciante eĉ unu familinomon. Supozeble al tiuj li atribuas la menciitajn en mia artikolo Svadost kaj Vartanjan. La unua estis filozofo-futurologo, la dua – aŭtoro de popularnivelaj prilingvaj libretoj. Ĉu ili konsiderendas kiel *pli* aŭ *malpli* kompetentaj pri Esperanto lingvistoj? Laŭ mi, ja *malpli*. Sed la *pli* kompetentaj, aŭtoroj de seriozaj interlingvistikaj kaj esperantologiaj studoj: Jevgenij Bokarjov, Viktor Grigorjev, Mahomet Isajev, Sergej Kuznecov, Aleksandr Duliĉenko, Boris Kolker, Aleksandr Melnikov, Leonid Mjasnikov – konsekvence uzis kaj uzas por la lingvonomo *эсперанто* la minusklan formon. Mia oponanto certe povas klarigi tion per premo de la cenzuro, sed unue – la sama cenzuro ial ne malhelpis majuskligi al Svadost kaj Vartanjan, kaj due – tiuj el la menciitaj, kiuj aktive verkas en nuna sencenzura tempo, plu minuskligas.

Cetere, ĝuste lingvisto Sergej Kuznecov aŭtoris la akceptitan de la refonda SEU-Kongreso en 1989 Provizoran Statuton de SEU, el kies teksto (kompreneble, kun la minuskla *эсперанто*) fontas la postaj Statutoj de SEU kaj REU. Pri la Statuto-teksto ni laboris ĝis 1997, inkluzive viglan diskutadon dum la Kongresoj de SEU/REU en 1990, 1991 kaj 1995, tamen en tiuj kongresoj neniu, ankaŭ ne Gudskov, levis demandon pri eventuala majuskligo de la lingvonomo, do la minuskla

formo plu restis tra ĉiuj versioj. Do ne povis iel “fatale” roli mia REU-prezidanteco (1991-93, nur malgranda etapo en la tuta statuta historio), mankis kialoj por ke mi insistu pri mia persona prefero aŭ apliku premon, tio estas fantaziaĵo.

Kial ĝenerale mi emfazis la gravecon de la Statuto por la ortografio de la lingvonomo? Se allasi la ege malgrandprobablan supozon, ke REU-Kongreso akceptus kaj Minjust aprobus Statuton kun la majuskla lingvonomo, tiam la situacio estus esence alia, ĉar tiam ekzistus ŝtatnivele sankciita precedento kaj mi eĉ ne povus oponi tian uzadon. Tamen la Statuto estis prezentita al Minjust kun la minuskla formo. Tio montris la oficialan vidpunkton de REU, ke ĝi ja akceptas por si la ortografie norman formon. Do ne pro jura devigo, sed simple por esti konsekvenca, ne parolante jam pri simpla obeo al la lingvonormoj, REU uzadu en siaj eldonaĵoj nur la minusklan formon, eĉ se tio ne plaĉas al apartaj personoj.

Do, iom da konkludoj. Ĉu la pozicio de Gudskov havas apogon en la ortografia normo de la rusa lingvo? Ne, ne havas: la normo preskribas minusklon. Ĉu eble lia vidpunkto baziĝas sur altnivele oficialigita precedento? Ankaŭ ne. Sekve, lia kaprica insistado pri la majuskla formo de la ruslingva lingvonomo ne havas seriozan, konvinkan bazon. Ĝi fontas nur el lia persona gusto.

Niajn rusajn tekstojn ni verkas ĉefe ne por ni mem, sed por eksteruloj. Verkante tiajn tekstojn, oni devas sekvi neskribitan leĝon: por esti komprenata, alparolu homojn en kutima al ili lingvaĵo. Vere, por multaj el ili estas egale, ĉu ni uzus majusklon aŭ minusklon, sed ja ne por ĉiuj. Inter ili estas homoj kleraj, racie pensantaj (tre grava por ni parto de la publiko, ĉu ne?), kiuj la vorton *эсперанто* jam renkontis ie-tie plurfoje. Sed statistike en la nuna rusa tekstaro la minuskla formo ja dominas absolute. Sekve ili scias (aŭ okaze de dubo certiĝos per vortaro), ke la lingvonomo skribendas minuskle, ili kutimas al la minuskla formo; tial renkontante la malkutiman majusklan formon oni povas sperti malagrablan aŭ eĉ forpuŝan ŝoketon.

Estas tre trafa kaj eble ŝlosila la paraleligo de la majuskla Эсперанто kun “Li” en religiaj tekstoj. Tiu majuskligo montras ne simple estimon de persono (ĉu iu vidis similan majuskligadon en sekularaj tekstoj?), sed kultan adoradon de Dio. Ĉu ne similan religiecan kromguston portas majuskligado de la lingvonomo en niaj porpublikaj tekstoj? Mi metas min sur la lokon de nia potenciala leganto kaj imagas, ke en miajn manojn trafis libreto pri… io ajn, ekzemple vegetarismo. Certe, mi plurfoje renkontis ie-tie la vorton *вегетарианство*, sed ĉiam nur minuskle. Kaj se sur la kovrilo mi vidos “Факты и краткие сведения о Вегетарианстве”, tiu majuskla formo estos por mi tre elokventa. Eble mi foliumos por certiĝi, ke la samo estas tra la tuta teksto. Sed eĉ sen tio la diagnozo por mi estos klara: la vegetarismo estas por la aŭtoro(j) objekto de kulta adorado, mi riskas trovi en la libro ne sciencajn faktojn, sed ian religieskan doktrinon – kaj mi flankenmetos la libron. Kiu povas garantii, ke ni ne perdas simile potencialajn simpatiantojn de nia lingvo nur pro la majuskligo? Sed la minuskla formo estas neŭtrala, ĝi ne portas nedezirindan kromguston kaj ne povas kaŭzi forpuŝan reagon.

Esperanto estas normala homa okupo kaj ne bezonas malnaturan pligravigon per majusklo. Muzikistoj, ŝakistoj, filatelistoj ks ja estimas siajn okupojn, sed

trankvile uzas la vortojn *музыка, шахматы, филателия* ks minuskle, ne opiniante ke tio estus “humiliĝo antaŭ malamikoj” kaj ne zorgante pri afekta “sinestimo”. Nur tiu, kiu vere sentas pri Esperanto ian komplekson de malplivaloreco, bezonas apliki majuskligon kiel defendan reagon.

La supozataj de Gudskov “admonoj de diversaj ŝaninoj” rilate al mi estas plia frukto de lia fantazio. Mi kutimiĝis uzi la minusklan formon ne pro ies personaj admonoj aŭ instigoj, sed influe de sciencaj faktoj kaj reala vivo, kaj neniam diskutis la ortografion de *эсперанто* kun oficialuloj.

Estas interesa la esprimo “kaŝaj kaj malkaŝaj malamikoj de Esperanto”. Nu, al la malkaŝaj malamikoj evidente apartenas Ŝanina kaj similaj, sed kio pri la kaŝaj? Kredeble ili estas tiuj, kiuj ne dividas la opinion de Gudskov, do ne nur ĉi-subskribinto, sed ankaŭ la lingvistoj-esperantistoj, menciitaj meze de ĉi tiu artikolo. Verdire, ne la plej malbonan kompanion mi trafis…

***Viktor Aroloviĉ (Moskvo)***

---

*Per tiuj ĉi artikoloj mi proponas fini la diskuton pri “Э/э-сперанто”, aŭ, se ankoraŭ restis gravaj argumentoj, transigi ĝin al la retlisto <reu-agado>. Sed ŝajnas, ke la plej gravaj argumentoj por ambaŭ opinioj estis jam eldiritaj. Ĉiu interesiĝanto mem povas elekti, kies argumentoj pli konvinkas. Ekzemple mi povas konfesi, ke min ne konvinkis la argumentoj de Nikolao, kaj mi plu uzos la minusklan formon, restante per tio “malamiko de Esperanto” (mi nur ne povas distingi, ĉu mi estas kaŝa aŭ malkaŝa “malamiko”). Tamen, sendepende de la argumentoj, restas la fakto, ke Nikolao faris ŝanĝojn en fremda teksto kontraŭ volo de la aŭtoro (tion ne neas Nikolao mem). Laŭ mi tio aspektas ne etike.*

***Garik Kokolija***

---

## ĈALK-EKZAMENOJ

La 13-an de decembro 2004 en Moskvo okazis element-nivela ekzameno de la Ĉefa Atesta kaj Lingva Komisiono de REU. Ekzamena komisiono konsistis el ĈALK-membroj I.Gonĉarova kaj N.Gudskov. Ekzameniĝis 3 personoj (ĉiuj – moskvanoj) kun la sekvaj rezultoj: Varvara Ĥoĥluŝkina – perfekte, Vladimir Lariĉev – bone, Stanislav Skrebcov – bone. Gratulojn al la sukcesintoj!

***Nikolao Gudskov (Moskvo)***

## MEMBROJ DE REU EN 2004

Entute en 2004 en REU estis **277 membroj**, inter kiuj 141 individuaj membroj (inkluzive de 4 familiaj membroj kaj 46 dumvivaj membroj) kaj 136 aligitaj membroj en 9 aliĝintaj kolektivoj (*Eŭropa Jura Universitato “JUSTO” (7 aligitaj membroj), Ivanova E-klubo (12), Ivanova Medicina Esperanta Asocio (IMEA) (17), Moskva E-klubo “EK-MASI” (46), Samara E-klubo (12), Tiĥvina E-klubo (12), Vladivostoka E-klubo “Pacifiko” (15), Volgograda Esperantista Junulara Centro “Stelaro” (10), Volgograda E-klubo “Espero” (5))*.

## REU-ALIĜOJ POR 2005

### ALIĜINTAJ KOLEKTIVOJ

**Moskva EK MASI** (20 aligitaj membroj): *Baŝlikova Anastasija, Ĉerniŝova Oljga, Gonĉarova Svetlana, Ĥoĥluŝkina Varvara, Ĵitĉenko Maksim, Kovalj Jelena, Lariĉev Vladimir, Legornev Aleksej, Ljubuŝina Jekaterina, Loginova Nadeĵda, Magomedĥabibulajeva Luiza, Mitrakova Marija, Penjkov Andrej, Penjkova Julija, Sago Galina, Sergejev Vladimir, Sidorova Valentina, Skrebcov Stanislav, Ŝirokova Jekaterina, Terjoĥina Marija*

**Sankt-Peterburga E-societo "Espero"** (5 aligitaj membroj, la listo dume mankas)

**Tiĥvina E-klubo** (12 aligitaj membroj): *Baraŝkov Vasilij, Belova Tatjana, Berger Jevgenija, Ĵuravljova Jelena, Kaĉalova Zoja, Kirjakov Anton, Koroteckij Aleksandr, Kroljus Tamara, Rajskaja Natalja, Smirnova Svetlana, Tiĥomirova Oljga, Vlasova Vera*

### INDIVIDUAJ MEMBROJ

*Bolŝakov Roman (Moskvo), Bronŝtejn Mikaelo (Tiĥvin), Ĉupin Bronislav (Iĵevsk), Gajvoronskaja Valentina (Rostova reg.), Gavrilova Oljga (Jekaterinburg), Gonĉarov Anatolo (Moskvo), Gorŝkov Miĥail (Niĵnij-Novgoroda reg.), Griŝin Maksim (Moskvo), Kalaŝnikov Aleksandr (Tjumenj), Kandalinskij Viktor (Tiĥvin), Kasimov Firdaus (Permj), Kitajkin Ivan (Surgut), Kivajev Jurij (Marij El), Kolodin Miĥail (Sankt-Peterburg), Konjaŝova Svetlana (Ĥabarovska reg.), Kudrjavcev Viktor (Jekaterinburg), Kurskij Ivan (Moskvo), Loskutova Tatjana (Ivanovo), Lukjanov Vladimir (Kurska reg.), Makarenko Valerij (Tverj), Maleĵ Ljubovj (Ivanovo), Milner Aleksandr (Moskvo), Morev Aleksandr (Sankt-Peterburg), Neĉaev Nikolaj (Irkutsk), Obrezkov Andrej (Ivanovo), Opletajev Vladimir (Surgut), Osokin Aleksandr (Sankt-Peterburg), Roĵdestvenskij Vjaĉeslav (Ĉeljabinsk), Samodaj Vladimir (Moskvo), Sibirceva Valentina (Lipecka reg.), Smetanina Svetlana (Moskvo), Sokolova Evelina (Krasnojarsk), Strelec Sergej (Ĉeljabinsk), Sudakov Vladimir (Primorskij reg.), Ŝevĉenko Aleksandr (Moskvo), Terentjeva Galina (Ĉeljabinsk), Tjulaĥov Spartak (Jakutio), Vasiljev Viktor (Vladimir), Zujeva Nina (Jelec)*

### FAMILIAJ MEMBROJ

*Karapetjan Rustam (Krasnojarsk), Kisel Natalja (Vladimir), Kudrjavceva Rafija (Jekaterinburg), Loskutova Maja (Ivanovo), Mironova Irina (Moskvo), Panasjuk Jelizaveta (Jelec), Ŝevĉenko Jelena (Moskvo), Terentjev Nikolaj (Ĉeljabinsk)*

---

***Ĉe la adreso <www.comail.ru/~esperanto/membroj-05.htm> ĉiam eblas vidi aktualan liston de la membroj.***

## REU-KOTIZOJ POR LA JARO 2005

50 rubloj (por eksterrusianoj – 5 eŭroj) – ***individua kotizo*** (la membrokarto, Jarlibro de REU, REU-bulteno kaj aliaj informoj de REU, voĉdonrajto en REU-Konferenco, rabatoj ĉe uzo de REU-servoj kaj en E-aranĝoj);

1250 rub. (por eksterrusianoj – 125 eŭroj) – ***dumviva kotizo*** (ĉio la sama dum la tuta vivo);

25 rub. – ***familia kotizo*** (la membrokarto, voĉdonrajto en REU-Konferenco, rabatoj ĉe uzo de REU-servoj kaj en E-aranĝoj);

100 rub. + 25 rub. por ĉiu aligita membro (ne malpli ol 5; krom individuaj membroj de REU) – ***kolektiva kotizo*** (po 1 ekzemplero de REGo kaj Jarlibro de REU por ĉiu komenciĝinta deko de la aligitaj membroj, aliaj informoj de REU por la kolektivo; la membrokartoj, voĉdonrajtoj en REU-Konferenco, rabatoj ĉe uzo de REU-servoj kaj en E-aranĝoj por la aligitaj membroj).

*La rabatita abono de REGo por ajna individua membro de REU (inkluzive la dumvivajn kaj familiajn, sed ne por la aligitaj) en 2005 kostos 100 rublojn (por la eksterrusianoj – 12 eŭrojn). La dumvivaj membroj, kiuj pagis sian kotizon en 2001-2003 (kaj tial ilia kotizo enhavis la koston de REGo), plu ricevados REGon sen aldona pago. Aliaj dumvivaj membroj (kies kotizo ne inkludis la koston de REGo) por ricevi la gazeton devos pagi ĉiujare la rabatitan abonkoston.*

***La rublaj kotizoj sendendas al: Чертилову Михаилу Константиновичу, а/я 21, Одинцово-6, 143006 Московская обл.; la eŭraj kotizoj pagendas al la konto reua-p ĉe UEA.***

---

Желаем Вам в Новом году:
1. Поверить в Деда Мороза
2. Больше времени проводить с любимыми людьми
3. Избежать простуды и хандры
4. Воплотить в жизнь блестящую идею
5. А лучше - две
6. Совершить головокружительное путешествие
7. Заработать кучу денег
8. Прочесть много хороших книг
9. Наконец-то пойти в спортзал
10. Выучить эсперанто
11. Не растолстеть
12. Не зачерстветь
13. Не раздражаться
14. Совершить еще 2005 замечательных поступков
15. Познать самого себя

2005

БИЛАЙН GSM

С НАМИ УДОБНО

*Dum la novjaraj festotagoj la abonantoj de "Bee Line" (unu el la plej grandaj en Rusio firmaoj, liverantaj poŝtelefonajn servojn) ricevis de ĝi gratulkartojn, kiuj enhavis sur unu el la paĝoj bondezirojn por la nova jaro. La bondeziro kun la numero 10 tekstas "Выучить эсперанто" ("Ellerni Esperanton").*

# REJM-info

## REJM-agado: eksteraj rilatoj en la jaro 2005

*Tiu ĉi teksto estas skizo pri REJM-laboro rilate al eksteraj rilatoj (ER). Ni petas vin atente legi ĝin, ĉar la ekster-rilata agadkampo estas ekstreme grava por Esperanto-organizoj, des pli por la junularaj, ĉar nun oni havas multajn eblojn engaĝi sin en diverstemajn kaj multnivelajn agadojn junularajn por propra spertiĝo kaj socia utilo.*

### Organizoj por interrilati kaj eventoj por partopreni

Desupra kunordigado de partoprenado en aranĝoj naciskale ne bezonatas, ĉar neefikus pro la multeco de informoj kaj neevitebla specifeco de ĉiu regiono. Do bezonatos precipe informado kaj parta mastrumado.

### Lokaj aranĝoj

Ĉiun duan monaton: ekz. marte, maje ktp REJM-anoj sendu al la adreso <er.rejm@mail.ru> liston de aranĝoj, menciante kiuspeca helpo bezonatas (konsiloj, specifaj informiloj), kiam eblus ricevi raporton (kiuj organizoj partoprenis, kiaj estis la impresoj de ni aŭ de aliaj, kio problemis, kio rezultis).

Tiun informon akumulos REJM-komisiito pri ER, kiu poste verkos resumajn artikolojn, eventuale ankaŭ raportojn al TEJO.

### Verkado kaj eldono de manlibro pri ER

Tiu ĉi punkto urĝas kaj ege gravas, ĉar pere de ĝi kreskados la profesieco kaj kvalito de la tuta labordirekto! Komence de marto ni aperigu la projekton de manlibro (kontribuoj tre bonvenas!), ĉefe adaptante TEJO-manlibron al la rusia realo. Poste dum monato ni ricevu komentojn de spertuloj, de ER-komisiito de TEJO kaj de aliaj interesiĝantoj. La unua versio aperos rete, kaj tamen eldonindas ankaŭ la papera versio, se estos multe da interesiĝontoj. Ni esperas ke la manlibro vere estos inspira kaj utila helpilo por ĉiuj "ambasadoraj" aferoj.

### Monpetado

Pro tio ke malmultaj REJM-anoj kaj lokaj kluboj rekte petis monon de REJM por financi lokajn aranĝojn kaj, ŝajne, spertis monpetadon el eksteraj fontoj, ni supozis ke oni simple ne scias pri tiaj ebloj. Do post pli profunda esplorado de la af-

ero ni verku printempe informilon (raporton) pri tio. Se kluboj memstare ne kapablas okupiĝi pri aliĝado al subvenci-konkursoj, REJM konsile kaj mastrume helpu, aŭ en la nomo de REJM aliĝu aŭ trovu alian fonton. Ĉiukaze iniciatoj aperu demalsupre: ni certas ke bonaj ideoj ĉiam trovos la vojon!

## Murgazeto

Murgazeto pri Esperanto estu dediĉita al ekstera publiko – ne esprantistoj (ankoraŭ ☺), ruslingva, laŭplane en A1-formato, nigrablanka (ĉu nur?), dezajnota profesiece unuloke far aparta esperantisto kun kontribuo de informo el lokaj kluboj, eldonota en diversaj regionoj aŭ same unuloke, pendigota en mezlernejoj, universitatoj, bibliotekoj, hobiaj kluboj. Dispendigu volontuloj kiel eble plej ofte kaj vaste. Por pliriĉigi la enhavon kaj esti pli "proksima" al legantoj, la murgazeto estu duone regiona, tio signifas ke duono de la gazeto havos saman stilon, aspekton kaj enhavon, kaj cetera parto estos dediĉita al regionaj/lokaj eventoj. Minimume mi vidas tri eblajn regionojn: centra regiono (Kaliningrado, Okcidento, Nordo kaj centro), Sudo (Volgio, Apudkaŭkazio) kaj Oriento (Uralo, Siberio kaj Fora Oriento). La enhavo de la unua parto ĉiam estu ĝenerala informo pri E-o, movado, kulturo, mencio de gravaj internaciaj E-aranĝoj ktp, en la dua parto aperu regionaj anoncoj pri la estontaj aranĝoj, raportoj pri la pasintaj, sed gravas ke ili estu verkitaj en tre alloga maniero, kontraste al pli neŭtrala unua parto. Memkompreneblos enmeto de kontaktebloj kun lokaj E-kluboj kaj kun REJM.

---

# Kiel iĝi REJM-ano

*Membro de REJM rajtas esti ajna esperantisto en la aĝo de 14 ĝis 30 jaroj. Membriĝo en REJM donas la rajton havi rabatojn dum aranĝoj, partopreni en ATS, la eblojn esti ĉiam informita pri la vivo en Esperantujo en Rusio kaj eksterlande, pli facile trovi kunlaborantojn por siaj projektoj en la datumbazo de REJM-anoj, esti aktiva esperantisto kaj multon alian.*

1. Se vi antaŭe ne estis REJM-ano, unue necesas plenumi REJM-ekzamenon aŭ A-nivelan ekzamenon de ĈALK de REU.

2. Necesas pagi la kotizon. Ĝi estas 200 rubloj por la jaro 2005, el kiuj 100 – por REGo kaj 100 – kiel kotizpago. Se en la familio estas pli ol unu membro de REJM, ĉiu dua, tria k.t.p. persono pagas nur 100 rublojn, t.e. – sen REGo-abono.

Pli aĝaj samideanoj povas fariĝi patronoj de REJM (sen la ekzameno), koncerna kotizo estas 300 rubloj.

Vi povas pagi aŭ al sia reprezentanto en REJM-komitato aŭ al nomitaj de ni respondeculoj en aliaj urboj. Eblas sendi la kotizojn poŝte al ***Валентина Сидорова, ул. Нежинская 19 – 2 – 149, 119517 Москва.***

3. Bonvolu skribi al <membroj.rejm@mail.ru> aŭ al la poŝta adreso de Anatolij Krasnokutskij (*400040, Volgograd, pr. Metallurgov 76 – 137*) jenajn informojn:

– Viaj nomo, patronomo kaj familinomo.

– Via naskiĝdato, loĝloko, adresoj (paperpoŝta por ricevi REGon kaj, eventuale, ankaŭ la reta por pli urĝaj kontaktoj).

– Kiam vi eklernis Esperanton, kiamaniere, kion vi faras pri Esperanto: korespondas, aranĝumas, legas, verkas, babilas kun najbaroj ktp.

– Viaj ŝatoj, interesoj, kion vi volas fari en REJM, pri kio vi ŝatus okupiĝi. Sed, certe, vi rajtas simple subteni la junularan movadon finance. Bonvenegas ankaŭ informoj pri viaj kapabloj kaj emoj, ĉar tiukaze ni povas inviti vin al seminarioj, partoprenado en projektoj, volontuladoj, organizado kaj kontribuado al E-aranĝoj. Ni bezonas ankaŭ lokajn organizemulojn por fari reton de efikaj kluboj en la lando.

– Viaj bondeziroj al REJM.

# REJM-membroj en januaro 2005

*Sergej Andrejsons (Sankt-Peterburg), Oksana Burkina (Sankt-Peterburg), Baard Hekland (Norvegio), Konstantin Ĥlizov (Krasnojarsk), Vjaĉeslav Ivanov (Sankt-Peterburg), Oleg Izjumenko (Moskvo), Aleks Kadar (Francio), Anton Konstantinov (Ĉeboksari), Jelena Kovalj (Moskvo), Aleksej Kozlov (Niĵnij Novgorod), Anatolij Krasnokutskij (Volgograd), Alla "Benita" Kudrjaŝova (Moskvo), Anna "Morskaja" Maciboruk (Krasnojarsk), Jelena Maslova (Dimitrovgrad), Irina Semjonova (Ĉeboksari), Valentina "Grimpi" Sidorova (Moskvo)*

---

## PROJEKTO "tRA Siberio"

Esperanto-movado en Siberio tamen vigliĝas. Ĵus pasis novjara renkontiĝo "Sub la cedro", organizita en Novokuzneck fare de lokaj esperantistoj. La ĉefa organizantino Olga Sedova somere, dum RA-3, diris: "Ni devas renkontiĝi pli ofte!" kaj invitis novosibirskanojn veni dum novjaraj festoj al Novokuzneck.

Ni venis kaj trovis bonan akcepton. Programo estis jena: novjara maskerado, glitkonkurso, vizitado de saŭno, koncerto de folklora ensemblo el Ŝorio, festa tablo en la klubo "Cedro". Krome, dum tri tagoj de la renkontiĝo okazis kunsidoj, dum kiuj estis planita nova projekto: "tRA Siberio". La starto estos en Novosibirsk, la punkto de alveno – Bajkal.

Ĉu vi iam vidis Bajkalon? Tio estos bona ebleco por vi. Krome, laŭvoje vi vizitos Tomskon, Novokuzneckon, Krasnojarskon, Irkutskon. En ĉiu urbo vi havos halton por du-tri tagoj. Ĉie vin atendos speciala programo kaj renkonto kun lokaj esperantistoj. Kaj certe ekskursoj.

Plej gravas, ke vi povos partopreni ne la tutan aranĝon, sed la programon en unu-du urboj. Informon pri la programo kaj prezoj bonvolu rigardi ĉe la ttt-ejo <www.sciureto.front.ru>. Por pli detala informo turnu vin al Katerina Arbekova rete: <katka@dali.cis.ru>; poŝte: 630078 Novosibirsk-78, a/k 107; telefone: +7-3832-468494.

> Ĉefministro rifuzis doni subvenciojn por la lernejoj, sed ordonis elspezi grandajn monsumojn por instalo de televidiloj en ĉiuj prizonaj kameroj. En la amika interparolo li klarigis al la ministro pri klerigado: "Mi apenaŭ pasigos reston de miaj tagoj en lernejo!" ***(per-esperanto-humuro)***

# Eksciu, ke...

## NOVJARO EN E-KLUBO DE TIĤVIN

Pro diversaj eksterklubaj klopodoj tiĥvinaj esperantistoj festis la Zamenhof-tagon nur la 23-an de decembro, do estis decidite kunigi tiun feston kun la celebro por la venanta Novjaro. 25 personoj kunvenis en la etsalono de la urba Kulturpalaco ĉe la festa tablo. Sonis multaj tostoj kaj gratuloj, kantoj kaj pianludo. La novica grupo, gvidata de Zoja Kaĉalova prezentis surprize ĉarman spektakleton.



*gratulo de la prezidanto*

Tute eksteratende la feston vizitis raportistino de la urba ĵurnalo "Tiĥvinskaja Nedelja" (Tiĥvina semajno). Ŝi intervjuis la ĉeestantojn; rezulte en la pornovjara numero duonon el la gratul-paĝo akaparis esperantistoj. La alian duonon ricevis diversrangaj urbaj gravuloj. Jen estas kelkaj el la esperantistaj bondeziroj, publikigitaj en la ĵurnalo: "Ni deziras al ĉiuj tiĥvinanoj bonan sanon, multan ĝojon, sukceson por ĉiuj aferoj kaj bonkorecon reciprokan." (Aleksandr kaj Marina Koroteckij, kuracistoj); "Mi deziras al ĉiuj gelernantoj sanon kaj nur bonajn poentojn. Kaj krome mi deziras konsili, ke ĉiuj aliĝu al nia esperantista klubo por lerni tiun neordinare interesan lingvon. Ĝi helpas al homoj akiri multajn novajn amikojn kaj pli bone komunikiĝi. Mi nun lernas ankaŭ aliajn du lingvojn – la anglan kaj la francan, kaj Esperanto tre helpas min pri tio." (Aleksandra Kurma, 12 jaroj); "Mi deziras al ĉiuj, ke en la Nova jaro en ĉiu pasinta tago estu amenaŭ eta lumradio. Ke neniam estingiĝu espero, ke ĉiam ni havu feliĉon, ĉar ĝi estas en niaj animoj. Kaj, se ni volas esti feliĉaj, ni devas esti tiaj, ĉar ĉio dependas nur de ni mem kaj de nia rilato al la ĉirkaŭa mondo." (Zoja Kaĉalova, kursgvidanto). Tiujn ĉi kaj multajn aliajn helajn bondezirojn tiĥvinaj esperantistoj adresas al ĉiuj gesamideanoj en la mondo.



*nia junularo*

***Viktor Kandalinskij, prezidanto de Tiĥvina E-klubo***

## RIDETU APRILE EN ODESO




Odesa junulara Esperanto-klubo “Verdaĵo” invitas al la 7-a tradicia humurfesto “Aprilaj ridetoj”, kiu okazos de la 30-a de marto ĝis la 02-a de aprilo. Kutime en nia urbo la 1-a de aprilo estas libertago (nu, almenaŭ ĉe la malnova registaro...) Sur la ĉefa Deribasovskaja-strato paŝadas kostumitaj procesioj; la junularo frenezumas; la pli aĝaj urbanoj preferas dum tiu tago sidi hejme...

Ni proponas tempopasigon ne sen utilo: Urboludon, viziton al Observatorio (se la vetero permesos), al tre originala muzeo, la eblon partopreni humuran feston “Jumorina” sur la stratoj de la urbo kaj humuran koncerton “Aprilaj ridetoj” enkadre de nia programo. Ne mankos specifaj por nia klubo Intelektaj Ludoj. Verŝajne, plej alloga estos vizito al Odesaj katakomboj – ne al la oficiala muzeo, sed “sovaĝa” ekskurso kun la ĉefo de la speciala esplora taĉmento, kiu surmapigas niajn katakombojn: el la ekzistantaj 2000 km dume estas esploritaj nur 200 km. La subteraj galerioj, kie oni jen rampas, jen kaŭre iras; karstaj putoj; spuroj de partizanoj; rustiĝintaj bajonetoj kaj 200-jaraj boteloj; absoluta tenebro kaj ĉiam konstanta temperaturo – 14 gradoj vintre kaj somere. Promeno en labirinto centoble pli komplika, ol tiu en Kreto, kaj sen la fadeno de Ariadna! Sed nia gvidanto estos ĝuste la estro de tiu taĉmento, kiu savas kretenojn, kiuj deziras promeni en Odesaj katakomboj solaj! Nur kun li endas katakombumi! La dezirantoj ne forgesu malindan superveston kaj molan ĉapeton por protekti la kapon kontraŭ “plafono”! Pliajn detalojn la interesiĝantoj petu ĉe Tatjana Aŭderskaja (la retkaj poŝtadreson vidu en la 3-a kovrilpaĝo).

***Tatjana Auderskaja (Odeso)***

## LA UNUA EN RUSIO DOKTORA DISERTACIO PRI INTERLINGVISTIKO

La 24-an de decembro 2004 en la ĈGU (Ĉuvaŝa Ŝtata Universitato, Ĉeboksari) okazis defendo de la habilitata disertacio de Aleksandr Melnikov pri la temo “Lingvokulturologiaj aspektoj de internaciaj planlingvoj (je fono de la etnaj)”. Por oponi lian disertacion venis Sergej Kuznecov, profesoro de MŜU, kaj Vladimir Alpatov, vicdirektoro de la Instituto de Orientologio de la Rusia Akademio de Sciencoj. Ambaŭ oponantoj, samkiel la tria (la loka), subtenis la disertacion. La ĉeestintoj (pluraj filologiaj profesoroj de la universitato) alte taksis la laboraĵon de A. Melnikov.

Cetere, la universitataj moŝtuloj interesiĝas pri fondo de interlingvistika societo ĉe ĈGU, kursoj de Esperanto k.s. kaj certe pri aktiva kunlaboro kun la aliaj universitatoj tiurilate.

***(esperanto-rus-informoj )***

## FORPASIS ZHANG QICHENG

La 22-an de decembro forpasis s-ro Zhang Qicheng, honora prezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL), eksa ĉefredaktoro de “El Popola Ĉinio” kaj ekde 1986 honora membro de Universala Esperanto-Asocio.

S-ro Zhang naskiĝis en 1913. Li eklernis Esperanton en 1928 kaj baldaŭ fariĝis unu el la plej elstaraj aktivuloj en la ĉina Esperanto-movado. En la 30-aj jaroj li kunfondis Ŝanhajan Esperanto-Ligon kaj redaktis la gazetojn “Ĉinio Hurlas” kaj “La Mondo”. Post la ekesto de Ĉina Popola Respubliko li kunfondis ĈEL kaj ĝian revuon “El Popola Ĉinio”. Dum multaj jaroj li estis ĝenerala sekretario de ĈEL. En tiu funkcio li pretigis la aliĝon de ĈEL al UEA en 1980 kaj reprezentis ĝin kiel komitatano A ĝis 1989. En 2001 aperis lia eseаro “Ĉina lingvo – la riĉa kaj bela lingvo”.

Kiel vicprezidanto de la Loka Kongresa Komitato s-ro Zhang havis ŝlosilan rolon en la organizado de la 71-a Universala Kongreso de Esperanto en Pekino en 1986. Li povis partopreni ankaŭ en la inaŭguro de la dua UK en Pekino en 2004 kaj fari tie emocian paroladon, kiu fariĝis lia lasta movada elpaŝo kaj adiaŭo al la Esperanta publiko.

***(Gazetaraj komunikoj de UEA, № 192)***

## HELMAR FRANK: LA ESPERANTISTO DE LA JARO 2004

Internacia sendependa magazino “La Ondo de Esperanto” (Kaliningrad, Ruslando) iniciatis en 1998 ĉiujaran proklamon de la Esperantisto de la Jaro. Al la projekto aliĝis reprezentantoj de diversaj tendencoj en la Esperanto-komunumo kaj sendependaj kompetentuloj. Kiel la unua laŭreato en 1998 estis elektita William Auld. En 1999 lin sekvis Kep Enderby. En 2000 estis distingitaj tri personoj: Hans Bakker, Mauro La Torre kaj Jouko Lindstedt. En 2001 laŭreatiĝis Osmo Buller, kaj en 2002 – Michel Duc Goninaz. Pasintjare elektita estis Dafydd ap Fergus.

Ĉi-jare la kandidatigantoj proponis 25 personojn, al kiuj la elektantoj povis doni siajn voĉojn.

La rezulto de la voĉdonado: 3 voĉojn ricevis Helmar Frank; po 2 voĉoj ricevis István Ertl, Povilas Jegorovas, Sten Johansson, Ilona Koutny, Katalin Kovats, Etsuo Miyoshi, Flavio Rebelo, Scott Redd, Chuck Smith, Zlatko Tišljar; po 1 voĉo ricevis Donald Harlow, Kalle Kniivilä, Atilio Orellana Rojas.

OProf. Dr. sc. cyb. habil. Helmar Gunter Frank, prezidanto de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS), estas proklamita kiel la Esperantisto de la Jaro 2004. La internacia ĵurio elektis lin pro la sukcesa kunordigo de la agadoj de AIS kaj de ties Universitataj Sesioj kaj pro ĉi-jara lanĉo de LEUKAIS (Libera Eŭropia Universitato Kelemantia de AIS en Komárno, Slovakio), unu el kies tri fondo-rektoroj li estas. Intervjuo kun profesoro Frank aperis en la februara kajero de “La Ondo de Esperanto”. Pliajn informojn vidu ĉe <http://Esperanto.Org/Ondo/index.html>, en la rubriko “La Esperantisto de la Jaro”.

***Halina Gorecka (Kaliningrad)***

## AŬTORAJ RAJTOJ KAJ FALSAJ AMBICIOJ

Komence Doktoro Zamenhof permesis al iu ajn traduki la Unuan Libron en ĉiujn lingvojn. Li revis pri rapida disvastiĝo de Esperanto. Post kelkaj jaroj li subskribis ekskluzivan kontrakton kun granda franca eldonejo "Hachette", kaj libera disvastigo de liaj novaj verkoj iĝis kontraŭleĝa. Verŝajne ekde tiu tempo aperis problemo pri aŭtoraj rajtoj en Esperanto.

Ofte mi ĉeestis la diskutojn, dum kiuj oni levis la demandon: ĉu eblas sen kontrakto kun la aŭtoro publikigi liajn verkojn en Esperanto: libroforme, sur CD-diskoj aŭ interrete? Ŝajne, ofte la sola konkludo de tiuj pridiskutoj estis, ke similaj publikaĵoj estas afero neetika rilate al la aŭtoro kaj senprestiĝa por esperantistoj entute. Multaj eĉ ne konscias, ke laŭ la Leĝo pri aŭtoraj rajtoj falsa produktanto estas kriminale persekutenda kaj povas trafi eĉ prizonon.

Estas laŭdinda kaj komprenebla fakto, ke ni provas traduki ŝatatajn verkojn en Esperanton kaj intencas prezenti ilin al vasta esperantista publiko. Sed jen aperas Entreprenema Konsilanto, ofte spertoruza en similaj aferoj, kaj proponas eldoni la tradukon. Estu atentaj. Se en la verko, de kiu vi faris tradukon, estas signo ©, aŭ skriba averto pri aŭtoraj rajtoj, tio signifas, ke oni ne rajtas sen konsento de la aŭtoro (tiu povas esti verkisto, tradukisto, pentristo, fotisto, redaktoro ktp) reprodukti ĝin en iu ajn formo. Eĉ se tia averto ne estas, preferindas konsulti pri la afero fakulon. La Entreprenema Konsilanto oponas: vidu ke Zamenhof… por disvastigi nian lingvon… estas por propagando... Ĉio estas trompo. Trompo kaj mensogo. La sola strebo de similaj "multobligistoj" estas la monprofito. Nur ĝi.

Kutime la "memeldonistoj" sukcesas ricevadi ĝis 200% de monprofito, dum la leĝaj eldonejoj ordinare funkcias je 20%-profitaĵo (kutima normo por eldonejo). De kie venas tia ŝajne enorma profito? Tute simple. Oni ŝtelas de verkistoj, tradukistoj, pentristoj, fotistoj, eldonistoj, de ĉiuj homoj, kiuj estas engaĝitaj en la eldonprocedon. Oni priŝtelas, finfine, ankaŭ la ŝtaton mem, ne pagante la entreprenajn impostojn.

La kontraŭleĝaj eldonoj en Esperanto abundas. Amase kopiiĝas diversforme ĉio, pri kio Entreprenemaj Esperantistoj intencas ricevi monprofiton. Certe unuavice staras diversaj lernolibroj kaj vortaroj de Esperanto. Sekvas la famaj aŭtoroj. Ankoraŭ dum sovetia tempo Boris Grigorjeviĉ Kolker, kiel mi scias, plendis pri amasa kontraŭleĝa produktado de lia lernolibro "Metodiĉeskie razrabotki...", kiuj estis vaste uzataj en tiutempa instru-procedo. Daŭras reeldonado de tiu ĉi lernilo ĝis nun. Sen indiko pri la aŭtoraj rajtoj. Mi havas ekzempleron kun menciita eldonkvanto 1000 ekz., kiu estis presita en 2000. La aŭtoro de la lernolibro por rusoj "Esperanto? Estas facile!" A.Junusov atentigis min, ke interrete kaj en CD aperis lia verko, pri kio lin neniu avertis. La mondkonata verkisto Harri Harrison dum renkontiĝo kun moskvaj esperantistoj ricevis donace sian libron, tradukitan en Esperanton: "Naskiĝo de la rustimuna ŝtalrato" (eld. Sezonoj, Jekaterinburg, 1996). La fama verkisto dankis kaj ĝentile rimarkis, ke oni lin ne informis pri ties apero. Eĉ ne temis pri la monkompenso.

Ni esperas ke aŭtoroj ne pretendas defendi siajn rajtojn juĝe. Sed kiam temas

pri neesperantistaj aŭtoroj, ofte famaj, tio ne validas. Kaj tiuj famaj homoj preskaŭ ĉiam ne akceptas la korporacian esperantistan solidarecon.

Ofte oni proponas al ni eldoni la tradukojn de diversaj verkoj, asertante ke ili ricevis buŝan konsenton de la aŭtoro (aŭ de la rajtposedanto). Similaj proponoj plejparte fine evidentiĝas provokaj, kaj ni ilin ne atentas. Eĉ se tia permeso efektive okazis, ĉiam estas necesa skriba konfirmo, preferinde kontrakto inter la eldonisto kaj la aŭtoro. La aŭtoro povas plurfoje ŝanĝi la rilaton al la afero, kaj por juĝaj instancoj buŝa konsento nenion validas. Ekzemple iu esperantisto sukcesis ĉiumetode konvinki la aŭtoron, ke eldono en Esperanto estas plena bagatelaĵo, senprofita kaj nur propaganda. Kaj poste la aŭtoro tute hazarde ekscias, ke lia libro estas vendata ie kontraŭ 20-30 eŭroj (ekzemple) kaj estas aĉetata. Kompreneble la aŭtoro povas rekonsideri sian opinion pri bagateleco de Esperanta traduko.

Somere de 2004 en moskvaj kinejoj aperis kinoversio de la romano de konata en Rusio verkisto Sergej Lukjanenko "La nokta patrolo". Nekutime, sed okazis: la ŝtato kune kun la oficialaj produktistoj aranĝis vastan kampanjon kontraŭ la kontraŭleĝaj kopiistoj. Multaj estis ***arestitaj***. (Mi emfazas la vorton ***arestitaj.***) Ja temis pri la enorma monsumo.

En Rusio la aŭtoraj rajtoj normiĝas per la Leĝo de Rusia Federacio "Pri aŭtora rajto kaj apudaj rajtoj". Laŭ ĝi la aŭtoraj rajtoj validas por la kreaĵoj de scienco, literaturo kaj arto, faritaj sendepende de ilia pluuzado, kvalito kaj esprimmetodoj, kiel publikigitaj, tiel ne publikigitaj, sed ekzistantaj en ajna formo: skriba, buŝa, aŭd- aŭ vid-kaseda, komputila, pentra, fota, skulptita, konstruita ktp.

Laŭ Kriminala Kodo de Rusia Federacio (Artikolo 146) rompinto de aŭtoraj aŭ apudaj rajtoj estas punata en ekstremaj okazoj je malliberigo ĝis kvin jaroj.

La kontraŭleĝaj eldonoj ne eblus, se ne ekzistus tiel nomata "nigra merkato", en kiu vendistoj kaj amasaĉetantoj plene ignoras ajnajn aŭtorajn rajtojn. Vendistoj de Esperanto-literaturo, unuavice la Libroservo de UEA, naciaj asocioj, dezirinde estu pli elektemaj por atenti la falsajn multobligistojn. Ĉar ankaŭ de tio ja multe dependas nia reputacio antaŭ la neesperantista publiko.

***Aleksandr Ŝevĉenko, eldonisto (Moskvo)***

---

# ATENTON! TRE GRAVA INFORMO:

***Nuntempe estas aktive preparata la programo por RET-05 (Rusiaj E-Tagoj), kiu okazos de la 6-a ĝis la 14-a de aŭgusto 2005 apud la urbo Jelec. La temo de la aranĝo estas "Esperanto – ne nur lingvo, sed ankaŭ vivmaniero", la programo promesas esti interesa. Ekzemple, ĉi-foje ni havos Esperanto-ekskurson al la muzeo de Vasilij Eroŝenko en la vilaĝo Obuĥovka. Kun tiu ĉi REGo vi ricevos la unuan Informleteron pri RET-05.***

## *Mikaelo Bronŝtejn*

# Por Ĵomart Amzejev

Amiko, ni ambaŭ ne junas,
Sed estu tabua la tem' –
En koroj apenaŭ aŭtunas
La fajre junula amem'.
La manoj gitaron turmentas,
Dolore naskiĝas la kant'.
Feliĉon de kreo eksentas
Animo de ĉiu naskant'.

Profundas la trist' februara
Dum kirlas neĝerojn blizard',
Sed vojo en tempo amara
Kondukas nin tamen al mart'.
Retrilos printempo ekverde
En nia amika ĝarden',
Triumfos denove liber' de
Tremanta gitara tenden'.

Amiko, la kant' kontinuas
En tempo, en spac', en anim'.
Muziko kun vortoj kongruas,
Do vivas kompren' inter ni.
Diskreta ascendo al gloro,
Ŝtupare spirigas la pad'...
Folioj de nia memoro
Ne mankas por plia kantad'.

*19.02.05*

## KEF: “KORPO KAJ KULTURO”

***Kultura Esperanto Festivalo 2005 en Helsinko, Finnlando, 16-23.07.2005***

Ĉu jam vi spertis prezenton de Fraŭlino Barlaston aŭ konatiĝis kun Esperanta literaturo? Ĉu jam vi aŭdis la plej famajn bandojn de Esperantujo? Ĉu jam Dolchamar akustike? Ĉu jam vi ĉeestis preskaŭ tutvesperan, pli ol okazoplenan opervesperon de operkantistino Liisa Viinanen? Ĉu iam vi revis pri kantado de “Sola” aŭ “Amanda” aŭ “Ĉu vi pretas?” kun la efektiva bando mem aŭ pri Esperanta versio de “Titanic” aŭ James Bond-filmoj? Ĉu vi scias, kion pensas Esperantaj viraŭtoroj pri virinoj kaj inverse, kion virinoj opinias pri viroj?

Egale, ĉu vi respondas jese aŭ nee - indas partopreni la plejplejan, internacian Esperanto-kulturan festivalon KEF en la somera Helsinko. La festivalon organizas kunlabore FEJO kaj Esperanto Klubo de Helsinko.

Artistoj: Fraŭlino Barlaston, Jorge Camacho, Liisa Viinanen, Kim Henriksen, Arnau Torras, Martin Wiese, Duplustro, Ĵomart, Nataŝa kaj Karina, Esperanto Desperado, JoMo kaj la Liberecanoj, Dolchamar.

Disaj programeroj: Poema ateliero; Popateliero: poppecoj kaj kantotekstoj; Voĉouza ateliero: Kiel uzi sian korpon kaj pli utiligi sian plenan voĉoprovizon; Humura filmoateliero: famaj filmoscenoj aktore kaj duble; Korpkulturaj ekzercoj; Matena aerobiko laŭ espomuziko; Ludotago; Prelegoj kaj prezentoj; Beletraj amaferoj: Viroj pri virinoj, virinoj pri viroj; ABC de amo: amoj, mamoj, amoroj kaj mamzonoj - erotika poezio en Esperanto; Aŭtoraj horoj; Korpolingvo kaj kulturaj diferencoj; Ribele, rebele: Esperanta rokliriko; Granda konkurso pri filmodublado; Ŝamana vespero: ŝamandrumoj kaj kalevalaaj poemoj; Preskaŭ tutvespera Esperanta opero; Esperanta karaokeo kun vivbando; Komiksekzpozicio; Dolchamar eĉ akustike; Filmoj.

Kaj multo pli…Ne maltrafu!

Pliaj informoj troveblas ĉe la ttt-ejo <www.esperanto.fi/kef2005>, kontaktadresoj <hamalainen.riitta@kolumbus.fi>, <patrik.austin@helsinki.fi>.

***(per-esperanto-literaturo)***

## LIRO-2004

Je la Zamenhofa Semajnfino en Kaliningrad estis anoncita la rezulto de la tradicia belarta konkurso Liro-2004, organizita de “La Ondo de Esperanto”.

La seppersona juĝkomisiono (Aleksej Birjulin, Sten Johansson, Wolfgang Kirschstein, Aleksander Korĵenkov, Alen Kris, Valentin Melnikov, Petro Palivoda) ricevis 43 konkursaĵojn de 21 aŭtoroj el 14 landoj – Brazilo, Britio, Francio, Hispanio, Germanio, Italio, Kroatio, Luksemburgio, Malto, Pollando, Ruslando, Ukrainio, Usono, Uzbekio. La geografia reprezento estas rekorda.

### La rezulto de Liro-2004

*Originala prozo.*

Laŭreato: **Christian Rivière** (Francio) pro “Rimorso”. Laŭdaj mencioj: **Christian Rivière** (Francio) pro “Disigo”; **Paulo Sergio Viana** (Brazilo) pro “Rendevuo”.

*Originala poezio.*

Laŭreato: **Jean-Marie Ries** (Luksemburgio) pro "Omaĝo al L.E.". Laŭdaj mencioj: **Nicolino Rossi** (Italio) pro "L' ombro"; **Paulo Sergio Viana** (Brazilo) pro "Kampara rakonto"; **Ricard S. Güell** (Hispanio) pro "Meditado".

*Traduka poezio el la rusa (Александр Блок "Незнакомка").*

Laŭda mencio: **Pavel Moĵajev** (Ukrainio).

*Traduka prozo el la rusa (Иван Тургенев "Бирюк").*

Laŭreato: **Pavel Moĵajev** (Ukrainio).

*Traduka prozo el la angla (Edgar Allan Poe "The Devil in the Belfry").*

Laŭreatoj: **Jean-Luc Tortel** (Francio); **Russ Williams** (Usono).

La laŭreatoj ricevos diplomojn kaj libropremiojn. Konforme al la regularo la organizantoj rezervas al si la rajton ĝis la 1-a de januaro 2007 publikigi la ricevitajn konkursaĵojn en "La Ondo de Esperanto", libroforme kaj elektronike.

Gratulon al la laŭreatoj! Dankon al la partoprenintoj!

***Halina Gorecka, sekretario de Liro-2004***

## ITALA E-KONGRESO EN RIMINI

La 2–7-an de septembro 2005 en Rimini okazos la 73-a Itala Nacia Kongreso de Esperanto kun la temo "La interkomunikada fonto de progreso: la universalaj lingvoj". Rimini kaj ĝia marbordo, famkonataj en Italio kaj eksterlande pro someraj feriadoj, gastemo kaj amuziĝoj, havas imponan tradicion pri la okazigo de Esperanto-aranĝoj. La venonta Nacia Kongreso de Itala Esperanto-Federacio estos kroma okazo por rekonfirmi tiun tradicion. La detalojn eblas ekscii de Mario Amadei, tel. + 051 644 6675, <amadei.mario@yahoo.it> aŭ Don Duilio Magnani <duiliomagnani@iol.it>. Poŝta adreso: Comitato Organizzatore del 73° Congressso Italiano di Esperanto, Viale Zavagli 73, 47900 Rimini, Italio.

***(esper-inform)***

## StRIGo-10: ĈU NIRVANO... AŬ KOŜMARO?

StRIGo delonge allogis min pro originala, kreema nomo, pro ĝia mistero kaj ioma famo. Sed la aranĝo multe seniluziigis min, kaj kredeble la aliajn nerusparolantajn partoprenintojn, per sia lingvo-flanko. Efektive, StRIGo havis belaspektan Esperanto-retpaĝon, belsonan Esperanto-nomon, estas organizita de esperantistoj, partoprenita de multaj Esperanto-parolantoj, resume ĝi aspektas, gustas kiel Esperanto-renkontiĝo, sed ĝi ne estis Esperanto-renkontiĝo! Estis rusa aranĝo, partoprenita de Esperantistoj kaj novuloj, kiuj ĉiuj parolis preskaŭ ĉiam ruse.

Kelkaj plusaj aspektoj de StRIGo tamen, por ne esti tute malpozitiva pri ĝi. Interesaj partoprenintoj, plejparte afablaj organizantoj, ĝuinda koncerto, bongusta vingustumado, retpilko-ludado, kelkaj ideoj ĉerpitaj el refarindaj programeroj: poŝtkart-skribado, korpo-pentrado, vodko-gustumado (ne estis, sed indus) ktp. Eblis iomete plibonigi sian ruslingvan nivelon (sed ne estis kursoj…).

Aĉis la kondiĉoj. Necesejoj teruraj, duŝejoj forestaj. Endis paŝi 10 minutojn banejen kaj pagi 60 rublojn por povi duŝi sin.

Kelkaj anekdotoj pri la lingva problemo dum StRIGo:

– Dum la unua tago, post mia plendo pri la nur-ruslingveco de la aranĝo, la ĉeforganizantino trankviligis min: “Ankoraŭ ne estis la oficiala Malfermo!”. Sed post tiu vespera Malfermo, kiu escept-okaze dulingvis, ĉio daŭris kiel antaŭe. Nur ruslingve.

– Amuze estis, ke ĉiuj program-afiŝoj, programeraj nomoj, klasĉambroj estis esperantlingvaj. Sed tio estis nur ekstera ŝminkaĵo. Kiam oni nur iomete fosis, ĉio estis ruslingva. Ekzemple, la vingustumado: la klarigoj paperaj kaj parolaj estis ruslingvaj. Multfoje ni bezonis individuajn tradukantojn, por enoreligi al ni la tradukojn de programeroj!

– Ĉemure estis afiŝeto “Enskribiĝu ĉi tie homoj, kiuj parolas nur Esperante dum certa periodo” (?!) Ne estas ŝerco!

– Ĵus enirinte preleg-ĉambron, mi rimarkis apudulinon de la preleganto surplanke ridantan, kaj tuj poste la preleganto daŭrigis sian paroladon Esperante, kaj la apudulino tradukis poste rusen. Sed post du minutoj mi foriris, ne interesiĝante pri la temo. Restante aliflanke de la pordo, mi aŭdis, ke la preleganto ree parolis ruse, sen bezono de tradukantino.

– Cyrille demandis iutage al unu el la organizantoj, ĉu tiutage estos iu programero esperantlingva. Ŝi trarigardis la tutan liston de tagaj programeroj, kaj fine respondis “Ne”.

Mi povus longe daŭrigi la liston, sed ni eksciis, ke tiu StRIGo-10 estas la lasta, eble tial ĝi havis kiel jubilean temon “Nirvano”. Sed mi renomus ĝin “Koŝmaro”! Espereble kiam ni vekiĝos, tiu striko kontraŭ Esperanto estos nur memoraĵo pri la pasinteco…

***Aleks Kadar (Francio)***

## MEDICINA VORTARETO EN LA RETO

Laŭ la adreso <http://www.skirlet.freesurf.fr> atingeblas ne tro, sed sufiĉe granda medicina vortaro E-rusa kaj rus-Esperanta. Ĉiuj terminoj estis elektitaj surbaze de kelkaj fontoj, kiuj estas menciitaj en la paĝaro. La vortaro ne pretendas esti kompleta gvidilo, sed por ruslingvaj esperantistoj kaj medicinistoj ĝi tutcerte estos utila. La laboro pri la vortaro daŭras, do la kompilinto pretas akcepti ĉiujn rimarkojn kaj korektojn. La kontakt-adreso estas indikita en la paĝaro.

***(esperanto-rus-informoj)***

## EL LA VIVO DE BICIKLISTO

Finiĝis la komplika por mi jaro 2004, heligita per verda lumo de primavera Jekaterinburga E-renkontiĝo – bedaŭrinde la sola aranĝo, kiun mi sukcesis partopreni. Ni disputis tiam, ĉu estas Esperanta mondo reala aŭ virtuala. Mi rakontis pri PS (Pasporta servo) kaj BEMI (Biciklista Esperantista Movado Internacia), per kiuj mia esperantista vivo iĝas reala.

Pasintsomere mi planis vojaĝi kun BEMI-anoj al Altajo, sed la labora situacio tute malebligis al mi ferii. Tamen PS faris mian E-vivon reala per bonaj gastoj. Printempe, kiam ankoraŭ kuŝis neĝo, min vizitis "najbaro" el Magadana regiono – Sergeo Ĉikaĉov. "Najbaro" – ĉar en la adresaro de PS post Omsk sekvas Omsukĉan. Ĉiufoje, ricevante la adresaron, mi provis lin imagi, la "najbaron". Kaj jen, li venis petveturante hejmen el Kartvelio, rakontis al mi multe pri la eventoj en Tbilisi. Li rakontis ankaŭ pri Nordio, kiun li ŝatas malgraŭ la najbara Ojmjakon – poluso de frosto, kie la temperaturo povas fali ĝis 72 gradoj sub nulo.


renkontiĝo kun Ivo apud la trajno

Finaprile al mi telefonis mia malnova amiko Zef Ĵegard el Francio kaj diris, ke li startas la 1-an de majo de Atlantiko al Pacifiko por atingi ĝin dum du monatoj. Ne imageblas – 14000 km. Sed BEMI-anoj faras miraklojn! Li "flugis" sen aĵoj per malpezega biciklo po 200-250 km tage. Lia fratino kun la edzo akompanis lin dum la tuta vojaĝo en buseto kun ĉio bezonata, inkluzive rezervajn radojn kaj eĉ biciklojn. Pri la vojaĝo informis Moskva radio kaj Omska televido.

Sekva gasto, kiu flugadis dum la tuta vivo, nun trajnis tra Eŭrazio. Iama armea flugisto el Bulgario Vladimir Popov dum la vojaĝo en Ĉinion al UK-89 haltis kelkfoje ĉe pasportservanoj por piede kaj rade tuŝi la teron, viditan de supre. Li plezure biciklis en Omsko, ĝuis la vidindaĵojn, multe fotis.

Finsomere min vizitis Ivo Miesen. Antaŭ, dum kaj post la bicikla vojaĝo en Altajo ni interkomunikiĝis, ĉar mi tre volis ĝin partopreni, almenaŭ parte. Laŭvoje al Novosibirsk, de kie startis BEMI-anoj, mi havis kun li kurtan renkontiĝon ĉe la trajno. Poste ili telefonis el Gornoaltajsk, laŭvoje al la lago Teleckoje. Bedaŭrinde mi ne povis aliĝi, mi tiutempe laboris eĉ sabate kaj dimanĉe. Kaj dum la reveno Ivo haltis en Omsko por kelkaj tagoj, rakontis al mi pri la vojaĝo, montris la fotojn. Mi montris al li la urbon. Kaj jen, ni jam biciklas al la flughaveno, Ivo vojaĝas al Tiĥvin (por iom partopreni en RET-04), poste revenas hejmen.

Mi pasigis la someron hejme, sed vivis per reala E-vivo. Feliĉajn renkontojn al ĉiuj en 2005!

***Veniamin Rozenberg (Omsk)***

## ROMANO DE JOHN FRANCIS POR INFANOJ

Fine de novembro, ĝustatempe por lanĉo en la Malferma Tago de la Centra Oficejo, aperis ĉe UEA la romano "La kastelo de Vitro" de John Francis. La nova verko prenas tute apartan lokon ne nur en la verkaro de Francis mem, sed en la originala Esperanto-literaturo ĝenerale, ĉar temas pri porinfana romano.

En "La kastelo de Vitro" du geknaboj, Stela kaj Ernesto, dum somera vagado trairas misteran pordon, malantaŭ kiu atendas ilin aventuro en magia mondo kun plej strangaj mirindaĵoj kaj grandaj danĝeroj. Kelkfoje la leganto eĉ povas senti en la verko trajtojn parencajn kun la famaj romanoj pri Harry Potter, kvankam pri influo ne temas, ĉar Francis finis sian romanon jam antaŭ dudeko da jaroj. Unue ĝin planis eldoni Neil Salvesen sub sia marko "Esperantaj Kajeroj", sed lia forpaso malhelpis tion, ĝis UEA transprenis la planon de sia iama direktoro.

La libro havas 197 paĝojn kaj estas ilustrita de Francisco L. Veuthey. Ĝia prezo estas 18 eŭroj, kun triona rabato ĉe la Libroservo de UEA por samtempa aĉeto de minimume tri ekzempleroj.

Aliaj verkoj de John Francis, kiuj estas ankoraŭ haveblaj ĉe UEA, estas la rakontaro "Vitralo", la sciencfikcia romano "Misio sen alveno" kaj "Tri rakontoj pri la Miljara Paco". Tuj elĉerpiĝonta estas la poemaro "Kvaropo" el 1952, en kiu Francis debutis kun siaj kolegoj el la skota skolo W.Auld, J.Dinwoodie kaj R.Rossetti.

***(Gazetaraj komunikoj de UEA, № 192)***

## BALDUR RAGNARSSON EN LA APRILA MALFERMA TAGO

Unu el la plej elstaraj Esperanto-verkistoj, Baldur Ragnarsson, estos la ĉefa gasto en la sekva Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA sabaton, la 23-an de aprilo. La islanda poeto prelegos dum la Tago pri du temoj. Unu prelego temos pri la islanda lingvo, kiu estas multrilate ekzota inter eŭropaj lingvoj kaj el kies riĉa literaturo Ragnarsson esperantigis plurajn ĉefverkojn. En alia prelego Ragnarsson pritraktos malsamajn sintenojn koncerne la Esperanto-literaturon, kiu estas konsiderata jen iluzio, jen miraklo, jen simpla fakto. Tiuj tri vidpunktoj – la malscie antaŭjuĝa, la subjektive fervora, la realisme objektiva – estos komentataj en la prelego.

Kiel tradicie, la vizitantoj povos profiti de grandaj rabatoj en la libroservo kaj gajni libron aŭ alian esperantaĵon en senpaga loterio. Kafo kaj teo, ankaŭ senpagaj, estos varmaj la tutan tagon.

La Malferma Tago daŭros de la 10-a ĝis la 17-a horo. La laborantoj de la Centra Oficejo varme invitas esperantistojn viziti sian propran domon en Nieuwe Binnenweg 176, Roterdamo.

***(Gazetaraj komunikoj de UEA, № 196)***

## IRONIA REPLIKO


En la lasta pasintjara REGo mi kun granda intereso tralegis rakonton de Viktoro Aroloviĉ pri la drameca lukto de esperantistoj dum la Montevidea Unesko-

Konferenco en 1954. Kelkajn vortojn mi volas diri pri tiu fiulo Blinkenberg. Eble juste oni diras, ke en Esperanto ne sufiĉas… insultaj vortoj, eldiroj. Ja en nia vivo ofte okazas akraj situacioj, tamen ni, “viktimoj de edukeco”, en tiuj momentoj uzas nur du-tri “fortajn” eldirojn. Do krom la kutimaj “Diablo prenu!” k.a. ni povas uzi en konvenaj okazoj tre elokventan insultaĵon: BLINKEN-BERGECO!

***Vladimir Ĉernov (Kaluga)***

## “REBELA SONO” DE DOLCHAMAR

Post longa periodo sen nova produkto vere roka, ke Dolchamar alvenas por rompi la silenton, vere estas mirige. Dolcxamar, kun CX antaŭe, navigis inter iom eksterteraj sonoroj kaj hezitaj impetoj inter teknoo kaj pli kutimaj ritmoj. Hodiaŭ aperas tute nova Dolchamar, kun CH anstataŭ CX, sed ankaŭ novaj muzikistoj kaj muzika direkto tute alia ol tiu, pri kiu ili kutimigis nin.




Kvankam aŭdeblas ankoraŭ kelkaj eĥoj de la antaŭa Dolcxamar, la bando fariĝis firme roka, solide strukturita, kaj eble pli grava en la klopodoj por la tekstoj kaj muzika investo. La kerna ideo de la albumo estas “ke kune eblas ĉio”, kaj pere de voĉo bone regata Patrik, la kapulo, kantisto kaj aŭtoro de la tekstoj, tion diras al ni en Esperanto flua kiel poezio.

Ŝajnas ke la bando fariĝis relative populara en Finnlando, laŭ la nombraj intervjuoj kaj publikaj koncertoj, kaj tio eĉ ekster la Esperanta mondo, tiel helpante la disvastigon de la lingvo kaj ĝia ideo.

Tiu artista metamorfozo kaj la elekto de la eko de la jaro por ĝuigi nin pri tio, ja estas simbolaj, kaj antaŭsignas la agnoskadon de la bando kiu nun fariĝis mejloŝtona. Dolchamar plenmezure demonstris sian sindonemon al Esperanto; kaj kvankam la bando vere profesiiĝis, la engaĝiĝo de la unuaj tagoj restas integra, kaj la sonoroj ĉiam tiom belaj kaj ribelaj.

Aĉetu ĝin... aŭ ne dormu plu!

Por aŭskulti fragmenton aŭ rekte mendi uzu la retadreson: <http://www.vinilkosmo.com//?disc=vkkd75&lng=e>.

***(Informletero de Vinilkosmo, № 11)***

# *Mikaelo Bronŝtejn*

# En la angulo de Eŭropo

## *(svagaj skizoj pri ordinara prelegvojaĝo)*

### LA KULPANTOJ

De kio komenciĝas kutime miaj turneoj? Certe, de la invito – ĉu mi iru tien, kie oni ne atendas min aŭ eĉ ne ŝatus min vidi entute?

Ĉi-foje la ĉefkulpantino estis Kristin Tytgat el Antverpeno, kiu dum la Internacia Festivalo en Kiel (decembro 2003) afable invitis min en sian urbon por prelegi. Ŝi estis la iniciatinto. Dum duonjara preparado iel-tiel formiĝis la internacia organiza teamo, kiun mi kore dankas por kelkmonataj zorgoj pri kunordigo de la itinero. Mi nepre ŝatus kun sincera danko nomi ĉiujn ĉi personojn. Ili estas Jean-Pierre Allewaert (Belgio), Katrin Bossong (Nederlando), Yves Nicolas (Francio) kaj Osmo Buller, Ĝenerala Direktoro de la Centra Oficejo de UEA. La lastan mi devas danki ankaŭ por la titolo de tiu ĉi raporto – estas li, kiu skribis, min invitante: "… mi aŭdis, ke vi intencas vagi en nia angulo de Eŭropo…".



Kaj certe mi tutanime dankas la organizantojn kaj gastigantojn en ĉiuj urboj kaj urbetoj, kiujn mi vizitis. Mi ne povas prezenti ĉi tie ĉiujn laŭnome, ĉar aperus la listo de sepdek personoj minimume, sed endas diri, ke per la zorgoj de tiuj bonkoraj homoj mi ĝuis senriproĉan bonfarton dum la longa kaj nefacila kvardekkvintaga migrado.

### LA VOJO

Endas eviti priskribon de la preskaŭ jarlonga preparperiodo. Ĝi estas pure teknika laboro de ĉiuj flankoj – la organizantoj kunordigas la itineron, mi preparas

programojn, konsiderante dezirojn kaj mendojn de ĉiu invitanta urbo. Sekvas formalaĵoj (tamen priskribendaj iam por utilo de eventualaj vojaĝontoj), ordigo de valizo-tornistro-gitaro, kaj fine – mi sidaĉas en buso, kiu pli-malpli hastas al la celo.

Mia multjara sperto montris, ke mi preskaŭ malkapablas dormi enbuse – pro tio ĉi-jare mi decidis komfortigi almenaŭ unu vojaĝnokton. Mi trajnumis al Minsk; dormo en la trajno estas tute kontentiga. Eĉ pli da gajno – en Minsk mi havis ŝancon renkonti esperantistojn kaj iom da tempo babili pri la problemoj de E-movado en Belorusio. Sekvas halto la plej nervoprena ĉe la belorusia-pollanda limo – ses horoj da atendo kun posta priserĉado de miaj valizo-tornistro-gitaro. Normala dialogo, ripetiĝanta ĉiufoje ĉe la landlimo: "Kial vi portas tiom da libroj? – Ĉar mi estas la aŭtoro. – Vi ne rajtas. – Kiu malpermesas? – Ĉu vere ĉiuj libroj estas viaj? Ja jes, vidu – jen estas mi, kaj jen. Kaj jen estas kvin eŭroj… – Sen problemoj, ĝis revido."

Ekde la pola flanko ĉio funkcias rapide kaj glate, la buso startas preskaŭ tuj, kaj post plia tagnokto je la kvara matene mi estas renkontita de du biciklarmitaj esperantistoj en Utrecht.



*kun "Kajto"*

**NEDERLANDO**

Utrecht, Den Helder, Apeldoorn, Eindhoven, Groningen, Zaanstad, Den Haag – sep urboj por sep tagoj. Ĉiutage ŝanĝinta la urbon, ĉu mi ion memoras entute? Estas kutima demando, kiam mi rakontas pri la vojaĝo al amikoj. Kial ne, mi respondas, restas ankoraŭ iom da memorĉeloj liberaj en la kranio. Estas ankaŭ la taglibro – mi kutimigis min noti la plej gravajn impresojn ĉiutagajn. Sed mi eĉ ne prenu la taglibron. Kion mi kapablus forskui el mia memoro? Ĉu la dunivelajn stratojn de Utrecht? Ĉu la korŝiran sunsubiron ĉe la Norda maro? Ĉu la biciklogregojn ĉestacidomajn en Groningen? Ĉu la dometon en Zaanstad, kie la caro Petro la Granda devis dormi, verŝajne, premante la genuojn al la mentono? Ĉu la ĉarman vilaĝon, inspirintan Vinsenton Van Gogh dum pluraj jaroj? Ĉu la imponegan Esperanto-Instituton en Den Haag? Ĉio sidas en la kapo kaj atendas konvenan tempon por detala primedito kaj priskribo.

Des pli, la homoj. Tiu grandanima grizhara ondo de nederlandaj esperantistoj.

Ja jes, ankaŭ mi estas grizharulo – eble pro tio miajn prelegojn/kantadojn vizitis plejparte tiaj aŭskultantoj, antaŭ kiuj mi sentis min knabaĉo. Aŭ tamen estas problemo en la landa movado pri varbado de junularo... Ĉiuokaze – mi sentis min tre komforte en ĉiu urbo, en ĉiu rondo esperantista. Ĉar miaj aŭskultantoj, absolute perfekte posedantaj la lingvon, ne nur komprenis min tuj post kaj foje eĉ antaŭ mia diro. Ili estis jam legintaj miajn librojn kaj emis diskuti prie. Ili ŝatis aŭdi min. Plej kortuŝa estis por mi la fakto, ke du aŭ tri samaj personoj ĉeestis en kelkaj diversurbaj prezentadoj – al mia scivolo ili klarigis, ke volas aŭdi laŭeble ĉiujn miajn prelegojn. Aparte agrabla surprizo por mi estis veno de "Kajto"-anoj al mia prezentado en Groningen, ankaŭ apero de firma junulara kerno en Den Haag, inkluzive certan ĉeboksaraninon.

## BELGIO

La kalendaro iom pli malstreĉa prezentis al mi eblecon konkludi, ke estas tre multaj vidindaĵoj en la lando.

En la apudmara Oostende, havante unu tagon plene liberan, mi eĉ sukcesis viziti flandrajn vilaĝojn kaj kamparojn, la hororfaman riveron Izer kaj la soldatan tombejon en apuda vilaĝo Vladslo. Tie ekkuŝis miloj da germanaj knaboj, metitaj kiel senviva karno en la flandran teron post batalo ĉe la sama Izer en 1914. Tie, inter akurataj vicoj kaj vicoj da plataj tomboŝtonoj, staras du ŝtonaj homoj, surgenuiĝintaj funebre. Ili estas "La Afliktitaj Gepatroj", skulptitaj de mondfama germana pentristino Käthe Kolwitz. Ankaŭ ŝia filo dekokjara, pereinta ĉe Izer, kuŝas tie sub iu el la plataj ŝtonoj. "Por ke post tiom da jaroj oni ne malatentu, ke ĉiu malamiko, kiu, plenumante solenan soldatan devon, perdis la vivon per kuglo aŭ bajoneto, estis filo de iu patrino." – diris mia akompananto Raf Seys, aŭtoro de la libro pri Käthe Kolwitz.

La pompa ĉefurbo de la unuiĝinta Eŭropo dekomence renkontis min amikpluvete, tamen poste permesis senpluvan promenon ekde la fama Manneken Pis preter palacoj kaj parkoj al la kafejo "Esperanto". En unu el la kunsidejoj de Eŭropa Konsilio mi vidis ovalan tablegon kun ŝildetoj, metitaj por ĉiu landa reprezentanto. Post vana ekserĉo de ŝildeto "Rusio" (por esti fotita) mi akaparis la lokon de ĉeĥa reprezentanto. La ovaltablegon ĉirkaŭis vitrumitaj budoj por tradukistoj – se oni (ni) iam likvidos tiun absurdaĵon, certe, la kunsidejo aspektos pli vasta kaj pli impona...

Vespereto en Kalmthout, urbo nevizitita pro frua sunsubiro, kaj matene – reekiro. Antaŭe la gastiganta FEL (Flandra Esperanto-Ligo) skribis al mi: "Bonvenon al pluva Antverpeno", do mi iom miris, havante bluan ĉielon, sunegon kaj agrablan promenon kun Ivo Durwael. Min ravis ĉio ĉi, sed precipe du domoj – tiu de Rubens kaj tiu de FEL. La lasta eĉ iom humiligas kaj pensigas: ĉu mi esperu ĝisvivi la tagon, kiam REU posedos ion similan en Moskvo?

Brugge. Biciklado inter antikvaj stratoj. Vintrospita turista svarmado. Bone, se nian Peterburgon oni nomas La Norda Venecio, do pri Brugge tiun nomon oni devas ripeti dufoje – ĝi meritas..

Kurtaj promenoj en Kortrijk – vespere kaj matene. La ĝemelaj turoj. La naturo,


kun Gregoire Maertens

protektata impete de ĉarmaj homoj, eble iom antikvamodaj. Mi levas de sur la herbo kelkajn manĝeblajn kaŝtanojn – eble ili sukcesos radikiĝi en mia apudurba terpeco.

Leuven – universitata urbo. Svarmas junularo en la placo, meze de kiu staras kompatinda metala vireto – la objekto de mokornamado dum studentaj festoj. Matena frosteto kaj promeno al maizkampo. Maiztrunkoj iom velkaj staras tamen fortike, atendante rikoltadon. Ankaŭ maizspikon mi kunportu hejmen – sen troa espero, ke la grenoj vivos en mia malvarma grundo.

Gent, la glora. Inter belegaj antikvaj temploj, domoj kaj kasteloj subite furoras afrika arto – ornamaĵoj, lerte produktitaj el bova sterko, miksita kun aloaĵo kaj kolorigita per naturdevenaj farboj. Provante aĉeti, ni informiĝas, ke ĉiuj ornamaĵoj, pendantaj nun en grandega ejo, estas jam disvenditaj.

Flandraj esperantistoj estas brila kompanio – ekde la interesega kaj tre estimata Gregoire Maertens, iama UEA-prezidanto, ĝis la kvinjara filozofiema denaskulo Tomas Demeyere. Flandraj esperantistoj estas pli diversaĝaj, do pli multnombre vizitataj estis miaj prezentadoj. Junularo venadis regule, inkluzive kelkajn eksajn sampatrujanojn (i.a. tiĥvinaninon Julinka).

## LA MALFERMA TAGO

La Malferma Tago tamen okazis inter la belgia kaj la francia partoj de la turneo. Du pliajn bonojn tio prezentis al mi. Unue, mi veturis al Roterdamo el Belgio per la aŭto, stirata de Ilja De Coster, apude sidis Julinka kaj Jorge Camacho – okazis do brila interbabilado duhora. Due, per afabla prizorgo de Claude Nourmont kaj Brian Moon unu nokton kaj la sekvantan duontagon mi bonŝance pasigis en la kvara lando – Luksemburgio, en ilia ĉarma hejmo.

Ĉu mi komentu la Tagon mem? Ĝi estis jam abunde komentita en la gazetaro, do mi ne ripetu la frazojn jam diritajn de aliaj. Mi diru nur, ke al mi persone la Malferma Tago plaĉis preskaŭ komplete, ĉar ĝi reale estis eta UK kun pli ol 150 partoprenintoj. Tuj post la alveno mi havis la unuan prezentadon, posttagmeze – la

duan, ankaŭ aliajn programerojn mi volegis ĉeesti, do ne havis la tempon eĉ por elsakigi mian fotilon.

Al mi plaĉis la programo, zorgeme kompilita. Al mi plaĉis la animigantoj de la programo: plejparte eble poeto Jorge Camacho, elane ĵetanta siajn poemojn en la publikon; la prezidanto de LitEA Povilas Jegorovas, memkompreneble, tute kontraŭa laŭkaraktere al Jorge, pace estinganta diversajn timetojn-problemetojn de estontaj UK-anoj; kaj estraranino de UEA Ans Bakker, trankvile kaj konvinke klariginta siajn taskojn.

Mi neniel volas diri, ke al mi ne plaĉis troabundo de vizitantoj – estas vera ĝuo esti kirlata en tiu enkoridora kaj enlibroserva svarmo, babili kun homoj, nu, minimume – saluti la malnovajn konatojn. Sed ŝajnis al mi, ke la CO-anoj estis grave embarasitaj pro tiu amasa vizitado, almenaŭ ili videble ne estis pretaj al tio. Estis por mi animdolorige, kiam mi, por du minutoj lasinte la saloneton post mia prezentado, ne simple malsukcesis repreni mian lokon en la saloneto, sed eĉ proksimiĝi je kvin metroj al la enirpordo! Ĉar okazis la prelego de Marjorie Boulton! Kiom mi revis aŭdi ŝin, sed ve… La saloneto en la Centra Oficejo certe ne kapablas akcepti eĉ duonon el la veninta amaso.

**FRANCIO**

Fakte, mi jam estis vizitinta Francion meze de la flandra parto. Laŭ reciproka interkonsento mi iris el la flandra Kortrijk por unu tago al la franca Lille kaj poste revenis por viziti plurajn flandrajn urbojn. La alia interesa fakto (eĉ por mi) estas, ke en la lando restis tamen urboj kun la esperantistaj societoj, kiujn mi ne vizitis dum du antaŭaj grandaj turneoj. Tamen eĉ en la lokoj, antaŭe ne vizititaj, mi sentas min iom hejmece – verŝajne pro tio, ke tiu mia enfranciiĝo estis jam la oka. Hejmece – ne signifas sen intereso. Vidaĵoj admirindaj abundas ĉiuloke – ne multas nur la tempo por vidi. Ankaŭ la decembra vetero ne ĉiam konvenas.

Estis nokta, porkristnaske lumigita Metz kun certaj domoj, kie evoluis la eventoj de la romano de Schwartz “Kiel akvo de l’rivero”. Mi volis vidi tion.

Estis la muzeo-ercminejo en Hayange, interesa por mi, kiel por eksministo.

La riĉega muzeo de fotografio en Chalon – la fotografi-inventisto Nicephore



Niepce loĝis en la urbo.

La antikva Dijon kun abundaj vidindaĵoj kaj kun subita surprizo – tre impona ekspozicio pri Anton Ĉeĥov. Eĉ pli granda surprizo – Nacia Esperanto-Muzeo en apuda urbeto Gray. Abunda salivumado en ĉiu el la sep ĉambroj, ĉe la aĵoj – vidindaj, foliumindaj, palpindaj. Mi restus tie almenaŭ por monato, sed havis nur iom pli ol horon. Ho ve al mi!

Rouen renkontas min nebulvolvita, do la promeno estas same svaga kiel la nebulo: "Jen estas nia altega katedralo – Kie? – Jen, vi povas vidi almenaŭ ĝis kvinmetra alto! – Aĥ, jes… Jes, mi vidas!" En la placo, kie iam okazis ekzekuto de Jeanne d' Arc, certe estas konstruita preĝejo – tre moderna kaj tre impona.

La apudmara Le Havre estas en preskaŭ samdensa nebulo. Tamen vespere ĉe la maro mi bone vidas la famajn klifojn. Granda haveno; ŝipetoj, ŝipoj, ŝipegoj. Kanada greno, pola karbo, ĉinaj konteneroj. Maristaro. Ankaŭ la hotelo, kie mi pasigis du noktojn, havas la nomon "Les Gens de Mer" (Maristoj).

La ĝemelurbo de Tiĥvin – Herouville Saint Clair. Tien mi venas entute kvazaŭ hejmen – ĉar jam la sesan fojon. Ne escepte mi – pro la senĉesa dekkvinjara vizitinterŝanĝo profunde amikiĝinta estas almenaŭ duono de la loĝantoj de ambaŭ urbetoj.




Angers – abundas vidindaĵoj, mankas tempo. La mastroj demandas mian elekton: ĉu al la kastelo aŭ al David. Mi elektas la muzeon de Jean-Louis David. Mi ne bedaŭras pri tio. Samkiel pri sekvataga fulmrapida ekskurseto al la fama kastelo Grezijono. Ĝi aspektas alloge eĉ vintre. Vera juvelo de Esperanto-kulturo kun abundo da problemoj rekonstruaj kaj teknikaj.

Franca esperantista movado estas la plej publika. En ĉiuj urboj la invitintoj zorgis uzi mian venon por aktive konigi la lingvon al eksterespa loĝantaro. Per anoncoj radie kaj per artikoloj gazetare. Per dissendado de invitiloj. Per uzo de publikaj kunvenejoj. Rezulte mi parolis kaj kantis por 34 lernantoj kaj instruistoj en liceo de Lille, por 57 personoj en sinagogo (!) de Metz, por 72 personoj, inkluzive kelkajn anojn de ukraina societo, en Nilvange, por 78 personoj, inkluzive unu inon el Vorkuta (!), en Chalon k.t.p. Inter la aŭskultantoj certe estis ankaŭ esperantistoj,

sed neesperantistoj pli aktivis pri demandado postprelega kaj eĉ aĉetadis kodiskojn en Esperanto. Pure esperantistan aŭditorion mi havis en Angers – 78 personojn, kiuj venis el tri urboj por kunfesti la 100-jaran jubileon de loka E-societo.

### *ADIEU, PARIS!*

Mi venis en la francan ĉefurbon post la fino de mia turnea programo. La vizito estis absolute privata, kaj tiu fakto estis ĉi-okaze bonŝanca por mi. Ĉar mi venadis Parizon multfoje ankaŭ antaŭe, sed ĉiam havis nur du-tri horojn por ŝanĝi stacidomon aŭ por atingi flughavenon.

Mi ne dirus, ke tiu ĉi vizito estis plensufiĉa por ekkoni Parizon, sed mi eksentis almenaŭ la etoson, la inspiran tenton de tiu urbo, promenante sola dum sunplena decembra tago. Tie, en iu kafejo aperis la versoj, per kiuj mi ŝatus fini la raporton pri mia restado en la angulo de Eŭropo.

Varmigas nun decembra sun'
Dum tago-vago en kaj kun
Ŝatata strata homamas',
Senĉapeliga embaras'.
Antaŭ majeste pompa plac',
Antaŭ modele pimpa glac',
Antaŭ pontara popuri' –
Humilas mi kaj kantas mi:

*Adieu, Paris!*
Finiĝos morgaŭ la feri',
Kunportos for
Mi nur vizion vian por
En la patri'
Sopiri pri kaj kanti pri...
*Adieu, Paris!*

Kortuŝa krea halucin'
Brakumas min, ensorbas min.
Plu daŭras tag', plu daŭras vag'
Kaj al Rohdin kaj al Balsac.
Al la pentristoj en Monmartr',
Al varma vino kun amar',
Ĉar por inspir' kaj por plezur'
Mi unu tagon havas nur.

*Adieu, Paris!*
Sen vino venas la ebri'.
En la sopir',
Kiel rezulto de la ir'

Laŭ strata stri',
Naskiĝas kri', vastiĝas kri':
*– Adieu, Paris!*

Fraŭlino ĉarma en metro'
Proksimas tro, ridetas tro...
Per la rigard' rapidas ŝi
Al la rigard' respondi "*Oui!*",
Sed ĉe la placo de Konkord'
Forglutas ŝin ovrita pord'
Al plenŝtopita trotuar'...
Kaj flustras mi: "*Au revoir*!"

*Adieu, Paris!*
Min ree juna sentas mi.
Momenta rev' –
De l' sapveziko hasta krev'.
Sen iluzi'
Mi dankas vin pro l' eŭfori'!
*Adieu, Paris!*

La monda glor', la venta vant',
Ŝokegaj por la vizitant',
Dorlotas menson, sed por mi
Animo via gravas pli.
Banala estas mia ver',
Sed eĉ sen gut' de malsincer',
Ke en la koro restos nun
Cikatro inter sen kaj kun.

*Adieu, Paris!*
Ho jes, finiĝas la feri',
En van', kun spit'
Mi tamen revos pri l' revid',
Kaj kun pasi'
Ne senespere diras mi:
*Adieu, Paris!*

*15.12. 2004*



**Averto:** *tiu ĉi numero de REGo estas la lasta, kiun ricevos ĉiuj abonantoj-2004. La sekva numero estos sendita nur al tiuj, kiuj pagis sian membrokotizon (kun REGo) en REU aŭ REJM por 2005 aŭ la ĉi-jaran REGo-abonkoston.*

## CERBA GIMNASTIKO

***1. KOKTELO.*** *Evidentiĝas, ke la rusa kaj Esperanto tute interplektiĝis inter si, kaj parton de rusaj vortoj konsistigas E-aj vortoj, ekz.* ***моно-грамма.*** *Do, sube vi trovos rusajn vortojn, kaj la kvanto de punktoj montras, kiom da literoj troviĝas en la ellasita parto, koincidanta kun E-vorto. La E-vortoj eniras kun finaĵoj. Por plifaciligi la respondon, post la rusaj vortoj enkrampe estas klarigata signifo de la E-vorto.*

| | |
|---|---|
| 1) **. . . . ца** | (ne povi ne fari) |
| 2) **ло . . . . тив** | (interpunkcia signo) |
| 3) **ре . . . . я** | (kunigi) |
| 4) **па . . . . ла** | (perforta forpreno) |
| 5) **. . . . . р** | (realaĵo) |
| 6) **им . . . . я** | (esti peranto) |
| 7) **эко . . . . я** | (tenti) |
| 8) **эко . . . . я** | (doni nomon) |
| 9) **г . . . д** | (*Aurum*) |
| 10) **. . . . . з** | (esti je dispono) |

***Solvo de la tasko en REGo № 6 (25)***

*1) rito; 2) oro; 3) levi; 4) suda; 5) peti; 6) ledo; 7) konus; 8) indus; 9) raso.*

---

**2.** *Necesas el la unua donita vorto ricevi la duan per ĉeno el vortoj; ĉiu vorto en la ĉeno devas diferenciĝi de la antaŭa nur per unu litero. Ekz.* ***korto – korko – porko – parko.***

a) KRENO – MIELO; b) GENTO – NACIO;

c) MAMUTO – KAMELO; ĉ) SEKSO – CERBO.

---

*La solvojn necesas sendi dum 2 semajnoj post ricevo de la gazeto al Tatjana Auderskaja poŝte (Ukrainio, 65026 Odessa-26, p/k 71) aŭ rete (<zoo@te.net.ua>, <verda99@mail.ru>).*

---

## UTILAJ ADRESOJ

**REU:** p/k 57, 105318 Moskvo; retadreso <esperanto@au.ru>; ttt-ejo <http://www.reu.ru/>.

**REJM:** retadreso <komitato.rejm@mail.ru>; ttt-ejo <www.tejo.org/rejm>.

**UEA:** Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; retadreso <uea@uea.org>; ttt-ejo <http://www.uea.org>.

***La 19-an de januaro 2005 pro postsekvoj de apopleksio mortis Solomon Visokovskij. Ni publikigas ĉi tie koncizan informon pri li kaj unu el liaj versaĵoj. Ambaŭ estas represataj el la poezia kolekto “Moskvaro”.***



Solomon Naumoviĉ Visokovskij naskiĝis en 1933 en Krivoj Rog (Ukrainio), studis metalurgion en Urala politeknika instituto en Sverdlovsk (nun – Jekaterinburg). En Moskvo loĝis ekde 1966. Havis sciencan gradon “kandidato de teknikaj sciencoj”.

Visokovskij esperantiĝis en 1988 en kursoj en la klubo “Lev Tolstoj” (E-instruisto – Anatolo Gonĉarov) kaj tuj provis traduki rusen “Ho, mia kor’”. Ekde komenco li treege aktive partoprenis laboron de MLEKo (Moskva Literatura E-Klubo), ties organo “Cerbe kaj kore” enhavas multe da liaj kontribuaĵoj – originalaj poemoj, tradukoj el la rusa kaj rusigoj de Esperantaj poemoj. Tre sukcesis liaj tradukoj al la rusa el Ludmila Jevsejeva, Georgo Deŝkin, Nikolaj Hohlov kaj aliaj. Liaj poemoj estis publikigitaj en “Litova Stelo”, “Moskva Gazeto”, “Scienco kaj Kulturo”, “Dia Regno” kaj “Monato”. Ili ricevis premiojn en literaturaj konkursoj, en “Muzo-1992” (Litovio) la poemo “Ĉio pasas” ricevis la unuan premion.

---

## ĈIO PASAS

Ĉio pasas... – severa, kruela kanono,
Kiu estis dirita de reĝ’ Salomono.
Ĉio pasas – la leĝo por ĉiuj vivantoj...
Sed eterne – ne mortas la Kanto de Kantoj!
Kaj pro tio – ne timu potencon de l’ morto,
Se al ni donas amon kaj kreon la Sorto!
Ne forgesu pri tio! Memoru la nuron:
Sur la tero ni devas postlasi – bonspuron!

***REGo*** **(Rusia Esperanto-Gazeto)** ***№ 1 (26) februaro 2005***

***komuna eldono de REU kaj REJM*** ***aperadas ekde 2000***

*redaktas* Garik Kokolija *kunredaktas* Viktor Aroloviĉ

*poŝta adreso* Pjatnickoje ŝosse 45 – 105, 125310 Moskvo, Rusio

*retadreso* <gazeto@mail.ru>

*materialoj de la gazeto povas esti represataj, kondiĉe ke la tekstoj restos senŝanĝaj kaj estos indikita la fonto*

***abontarifoj por 2005:***

*por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ – 140 rubloj sendendaj al:*
Георгий Владимирович Коколия, Пятницкое шоссе 45 – 105, 125310 Москва
*por loĝantoj de aliaj landoj – 15 eŭroj pagendaj al la konto* **kklg-r** *ĉe UEA*